

NOVEMBRO 2010


LITERATURAJ PAĜOJ 18-24  
LITTERATURSIDOR 18-24

# La Espero


SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

2010:5-6

Kiel li nomiĝas en Esperanto?  
Vad heter jultomten på  
Esperanto? Se sidan 17.



## Lingvotago, librofoiro kaj multo alia Språkdagen, bokmässan och mycket mer.



*Supre maldekstre: La lingvotago en Västerås.*

*Supre dekstre: Tomas Q Nilsson en la renkontiĝo en Norrköping. Foto: Olof Pettersson*

*Malsupre maldekstre: Margareta Andersson regalias vizitantojn per bombonoj en la librofoiro. Foto: Siv Burell*

*Malsupre dekstre: Boato apud Stokholmo, la urbo de la 2011-a Sveda Esperanto-kongreso. Foto: Olof Pettersson.*



## LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet  
ISSN 0014-0694  
junio 2010 • 98-a jarkolekto  
Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson  
Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:  
EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42  
Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

E-post: laespero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2011: 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlem  
savgiften.

Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider  
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2010:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
Postgiro: 578-5 Nätsida: www.algonet.se/~eldona  
E-post: eldona@telia.com Telefon: 070-5850054

## ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,  
Nätsida: www.e-g.se E-post: egarden@esperanto.se  
Telefon: 0590-309 09

### Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Bellmansgatan 42, 2 tr,  
754 26 UPPSALA, tel. 018-24 43 01

e-post: laespero@esperanto.se

*Stoppdatum Utkommer senast*

Nr 1 15 januari 15 februari

Nr 2 28 februari 30 mars

Nr 3 30 april 31 maj

Nr 4 15 augusti 15 september

Nr 5-6 31 oktober 30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har  
brådskande information som måste komma ut  
senast ett visst datum bör ta kontakt med redak-  
tören i god tid innan.

## NI PREZENTAS

## Britta Rehm



*Kie vi naskiĝis?*

Mi naskiĝis en Alingsås. Ĉar mia  
patrino mortis post dek semajnoj  
mia onklo min adoptis kaj mi  
translokiĝis al Gotenburgo.

*Kie vi loĝas?*

Mi nun loĝas en Gotenburgo.

*Pri kio vi laboras?*

Mi estas pensiulo, sed mi antaŭe  
estis kuracistsekretario pri  
rentgeno dum 45 jaroj en du  
malsanulejoj.

*Kiujn interesojn vi havas krom  
Esperanto?*

Mi estas kristano. Mi apartenas  
al Matteuskyrkan en la Evan-  
gelia libera eklezio. Mi ŝatas  
vojaĝi pere de Esperanto kaj kun  
aliaj kuracistsekretarioj. En  
1972 mi vojaĝis ĉirkaŭ la  
mondo. Mi ŝatas foti. Mi ankaŭ  
ŝatas krucvortenigmojn.

*Ĉu vi havas familion?*

Ne, mi estas vidvino.

*De kiam vi interesigas pri  
Esperanto?*

Jam en 1945, kiam mi havis 15  
jarojn la instruisto en lernejo

demandis ĉu iu volis lerni  
Esperanton en la libera tempo.  
Kelkaj lernis, sed nur mi ankoraŭ  
uzas Esperanton.

*Ĉu vi havas aŭ havis iujn taskojn  
en la Esperanto-movado?*

Mi estis dum 16 jaroj sekretario  
en la sveda sekcio de KELLI, sed  
ankaŭ estrarano de la internacia  
KELLI. En la Gotenburga klubo mi  
nun estas kasisto kaj  
protokolisto. Mi estis kasisto en  
la unua estraro de Esperanto-  
Gastejo.

*Ĉu vi havas iun favoritan libron?*

Mi malmulte legas, kvankam mi  
havas multe da libroj.

*Ĉu ekzistas aliaj interesajoj pri vi?*

La 8-an de Aprilo – la tagon  
antaŭ mia 80-jariĝo – Göte-  
borgsposten faris grandan inter-  
vjuon kun mi. Mi povis rakonti  
pri Esperanto. La rubriko estis  
Britta – en sprudlande esperant-  
ist (Britta – gajega esperantist-  
ino).

Intervjuis: Leif Nordenstorm

Fotis: Olof Pettersson

### Vortoj de la redaktoro

Ne mankas materialo al La Espero. Ĝi sufiĉis por 24 paĝoj. Ni  
diskutas gravajn demandojn pri la estonteco de la Esperanto-  
movado? Ni ankaŭ donas kelkajn raportojn pri okazintaĵoj kaj du  
novelojn. Cetere: Kiel nomiĝas "jultomten" en Esperanto? Legu!

Via redaktoro

# La Libra kaj Biblioteka Foiro de Gotenburgo 23-26 septembro

*Esti eksponanto dum la Libra kaj Biblioteka Foiro en Gotenburgo estas interesa sperto! Kune kun aliaj societoj sen profita celo ni ekspoziciis sur "La Internacia Placo".*

"Ni" estis kelkaj membroj de la gotenburga Esperanto-klubo.

Antaŭ la Foiro oni partoprenas en kunvenoj, kie la projektgvidanto informas kaj respondas al niaj demandoj. Oni ankaŭ renkontas siajn najbarojn de la Foiro. Dum unu kaj duona tagoj nur homoj kiuj profesie laboras pri libroj (bibliotekistoj, instruistoj kaj studentoj) rajtas alveni.

La temo de 2010 estis Afriko. Afriko estis la temo de la librofoiro en tiu ĉi jaro. Tial ni rakontis ke ekzistas afrikaj verkistoj, kiuj verkas en Esperanto. Multaj homoj miris pri tio. Libroj verkitaj de afrikanoj troviĝis, sed por neesperantistoj eble estis pli inspire aŭskulti la kompaktan muzikan diskon Konga Espero/Afrika kompilo – kun tekstlibreto en la sveda kaj en esperanto. Mi rekomendas la KD:n, aĉetebla ĉe UEA aŭ Vinilkosmo.

Jam la unuan tagon, ĵaŭde, venis pli da junuloj ol mi memoras de antaŭaj foiroj.



*Siv Burell (dua de maldekstre) kun vizitantoj.*

Ili ne havas la antaŭjuĝojn pri esperanto, kiujn ni de tempo al tempo trovas ĉe mezaĝuloj.

Ĉi-foje ni kalkulis la homojn kun kiuj ni parolis dum kvin minutoj aŭ pli. La unuan tagon tio okazis kun pli ol 100 homoj. Vendrede posttagmeze oni malfermis por la publiko. Dum la kvar tagoj entute ni pli ol kvin minutojn parolis kun 635 homoj, kaj verŝajne kun preskaŭ dekoble pli dum malpli longa tempo. Nia celo ne estis vendi librojn, sed informi pri Esperanto. Mankis informiloj. Tial ni ĉefe buŝe informis pri la eblecoj trovi kaj studi Esperanton en interreto. Preskaŭ ĉiam ni estis tri homoj en nia budo.

Sur tekst- kaj bildtabuleto la junuloj povis testi sian komprenon de esperanto – sen antaŭaj studoj -kaj miri pro la rezulto. Lars Forsman, rektoro de la Sveda Esperanto-Instituto, kaj deĵoris ĉe la librotablo kaj prelegis ĉe du okazoj por sufiĉe granda aŭskultantaro. La unua temis pri liaj jaroj en la Esperantofaka branĉo de Karlskoga Popolaltlernejo, la dua temis pri "La lingvo, la idéo kaj la realo". La entuziasmo kaj ĝoja

prezentadstilo de Lars ĉiam donas bonan resonon. Li vendis sufiĉe multajn ekzemplerojn de sia nova libro: "Esperanto – pli ol 50 miljonoj da trafoj". Bonege ke nun troviĝas nova, bela, svedlingva libro pri esperanto kun multaj fotoj. La libro ankaŭ donas bonan enkondukon en la lingvon mem.

En Gotenburgo en 2010, oni preskaŭ ne festenis la 26an de septembro, kiu estas "la Eŭropa Tago de Lingvoj", eble pro tio ke la tago okazis dimanĉe. Sur nia librotablo tamen staris foto kun enkadrita teksto pri ĝi. Estis agrable montri al vizitantoj broŝuron fare de la Eŭropa Konsilantaro. En tiu broŝuro, ĉiu lingvo aŭ lando estas reprezentata de knabo aŭ knabino vestataj en naciaj kostumoj, -krom esperanto, kiŭ anstataŭ ricevis tutan terglobon! Esperanto ja ne nur estas eŭropa lingvo, sed ĉefe internacia.

Ni, kiuj deĵoris dum la kvar Foirtagoj, esperas je daŭrigo la venontan jaron.

La Libra kaj Biblioteka Foiro ofertas bonan okazon reklami por esperanto. Multaj junuloj antaŭe neniam aŭdis pri ĝi.

Siv Burell&Anita Dagmarsdotter



*Lars Forsman prelegas. Maldekstre: Anita Dagmarsdotter. Foto: Siv Burell.*

# Europeiska språkdagen

## I Stockholm:

*Europeiska språkdagen, 26 september, uppmärksammades bland annat i form av aktiviteter i Europahuset i Stockholm, dock på måndagen den 27:e för att locka fler skolungdomar.*

Under förmiddagen bjöd EU-kommissionen in till ett seminarium med rubriken Språkkunskaper – en konkurrensfördel för företagen? där återkommande punkter från deltagarna var behovet och värdet av både språkliga och kulturella kunskaper för att bygga upp långsiktiga affärsrelationer, och medan att behärska engelska på tillräckligt hög nivå är viktigt i många sammanhang så räcker det inte i alla lägen. EU:s språkpolitik syftar till att uppmuntra språk-inlärning, främja språklig mångfald och integration, och mer långsiktigt att EU:s medborgare utöver sina modersmål ska behärska minst två andra språk.

### Språkcafé med tolv olika språk

Under eftermiddagen hölls ett språkcafé ordnat av nätverket Språkdagen i Sverige bestående av representanter från olika ambassader, språk- och kulturinstitut och andra organisationer, däribland Esperantoförbundet representerade av Olof Pettersson, Linus Ganman och Ulrika Hoppe. Varje organisation hade ett eget informationsbord och ett antal stolar där grupper av besökande skol elever på högstadies- och gymnasienivå från skolor i Stockholmsområdet fick sitta en stund och lära sig lite om språken och prova på lite själva. Förutom att prova på olika språk – estniska, esperanto, franska, tyska, litauiska, kroatiska, slovakiska, spanska, finska, svenskt teckenspråk, romani och tjeckiska – kunde man också gå tipspromenad med frågor om de olika språken



*Ulrika Hoppe och Linus Ganman vid Esperantoförbundets informationsbord. Foto: Olof Pettersson*

och vinna priser skänkta från de medverkande organisationerna. Utbildningsradion visade också sin språkwebbplats Anaconda.

### Prisceremoni för affischtävlingen

Mot slutet av dagen hölls en prisutdelningsceremoni för vinnarna av den affischtävling som utlysts på Språkdagens hemsida, [www.sprakdagen.nu](http://www.sprakdagen.nu). Ett fyrtiotal bidrag hade skickats in, och några av dessa projicerades i ett bildspel under eftermiddagen. Vinnarna, Louise Nilsson, Felicia Dambach och Moa Paulsson från Katedralskolan i Skara fick ta emot 20 000 kr i språkresecheckar för sin affisch "Kunskapens träd". Samtliga inskickade bidrag kommer dessutom att visas på utställningen "Språken i mitt liv" på Internationella barnkonstmuseet i Vårby gård i Stockholm mellan 14 oktober och 13 november.

Olof Pettersson

### Kaj en Västerås:

Dum la Eŭropa Lingvotago en Västerås la 27an de septembro deĵoris i.a. Siri Bartusch, Wim Posthuma kaj Gudrun Nerpin. Alvenis ĵurnalistino de Väst-

manlands läns tidning. Ni havis multe da materialo, i.a. la ekspozicion de Hans Dahl kaj daŭran montradon sur granda ekrano de filmoj de la KD "Esperanto estas..." La filmoj estis aŭdeblaj en la kafejo, kio vekis intereson. Poste sekvis pli da informoj kaj diskutoj buŝe kun studentoj de diversaj kulturoj kiuj provis lerni la svedan lingvon. Iam mi klarigis al grupeto en la angla, ĉar ili ankoraŭ ne sciis sufiĉe de la sveda. Inter ili estas fraŭlino de Aŭstralio. Mi diris, ke la prononcado de la angla estas speciale malfacila por azianoj. Kaj ŝi diris "I agree".

Venis ankaŭ ĵurnalistino, kiu multe demandis kaj notis kaj fotis. La artikoleto aperis jam la 28an de septembro.

Nun la ekspozicio de Hans Dahl troviĝas en la biblioteko de Enköping ĝis la 8a de oktobro. Gudrun Nerpin ĝin observas por doni pli da informoj al trapasantoj. Ekde la 9a ĝi estos montrata en Norrköping.

Wim Posthuma



## TRA LA LANDO

### Kurs på Visingsö

Jag vill gärna ge en personlig rapport från sommarens esperantokurs på Visingsö. Naturen på Visingsö är fascinerande och vi hade tid till några intressanta utflykter med sakkunning guidning. Studierna var stimulerande med utmärkta och engagerade lärare. Vi var indelade i tre smågrupper utifrån tre olika kunskapsnivåer och det fungerade väldigt bra.

Dessutom bodde vi på en trevlig kursgård med god mat. Man tog god hänsyn även till oss som var vegetarianer. Atmosfären på kursgården blev extra stimulerande eftersom där även pågick andra typer av kurser.

Våra lärare hade en kväll också en typ av introduktion med tid för frågor från ett antal nyfikna av dessa de andra kursdel tagarna. Sammanfattningsvis var det en utmärkt kurs som jag varmt rekommenderar. Själv kommer jag gärna tillbaka nästa sommar. Deltagarantalet var cirka 12.

Jan-Erik Nordlund  
Helsingborg

### Kontakto kun Kuba klubo

Ni, kaj specife nia prezidanto Ingvar, daŭre flegas la kontakton kun la amika, preskaŭ ĝemela klubo en Bayamo, Kubo. La donacoj kiujn ni sendis al ili estis multe aprezitaj kaj ni elkore dankas al tiuj membroj kiuj portis ilin tien.

La EKSpreso

### Agado en Stokholmo

El la programo de la Stokholma klubo: la 1an de Decembro, Tradicia kantovespero; la 8an Sveda arĥeologio en Grekio Robin rakontas pri la arĥeologiaj priesploroj en Grekio faritaj kaj

-ataj de svedoj dum la lastaj cent jaroj; la 15an Jarfina festo.

EKSpreso

### Esperanto-budo en Skolforum

La sveda foiro Skolforum direktas sin al instruistoj kaj aliaj kiuj laboras en lernejoj, kaj en ĝi oni trovas budojn de la grandaj svedaj eldonejoj pri lernolibroj, kaj budojn de multaj organizaĵoj kaj asocioj. Ĉi-jare ĝi okazis en Älvsjö ĉe Stockholm, la 1-3 novembro 2010, kaj pli ol 16.000 personoj vizitis la foiron dum tiuj tagoj.

Esperanto-budo estis organizita de Roland Lindblom, kiu jam dum multaj jaroj prizorgas budon je tiu foiro. Lin helpis Linus Ganman, Kerstin Rohdin, Noline Kinch, Ann-Louise Åkerlund kaj Jadir Bandeira. Ankaŭ Roland Larsson helpis pri la transportoj de materialo.

Dum la monatoj post Skolforum, kutime venas informpetoj de lernantoj, kiuj trovas la adreson en la interreta paĝo [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se), kaj oni povas diveni ke instruistoj mencias esperanton.

Ulla Luin

## NEKROLOGO

### Majken Svensson

Under min tid som medlem i Kungälvsklubben lärde jag känna Majken Svensson. Hon var glad och gästfri och jag har varit hemma hos henne många gånger på kurser, sammankomster och fester. Runt hennes matsalsbord var det plats för både arbete, god mat, kaffe, diskussioner och glada skratt. Det var ett hårt slag för henne när systemen Märtha Andréasson dog. De båda tillsammans var ett oslagbart och drivande team. Majken var engagerad i mycket förutom esperanto. Bl. a. Var hon en mycket aktiv och duktig skådespelare i PRO:s teatergrupp i Kungälv. Jag är tacksam för att ha känt henne och för alla glada minnen jag har av henne.

Helfrid Karlsson

## NEKROLOGOJ

### Margaretha Skarin

Margaretha Skarin (1921-2009) partoprenis kurson en Karl-skoga, gvidis kluban kantgrupon kaj ludis pianon dum niaj monatkunvenoj. Ĝis sia morto ŝi partoprenis konversacian studrondon kiun NBV aranĝis en ŝia hejmo. Ŝi mortis la 28an de Novembro 2009.

### Andreo Roos

Andreo Roos (1916-2010) estis fervora esperantisto ek de sia junaĝo. Li partoprenis multajn Universalajn Kongresojn, plej laste en Vilnius 2005. Faris longajn vojaĝojn per biciklo inter alie en Francio, Grekio kaj Turkio. Partoprenis laborbrigadojn en tiama Jugoslavio kaj Bulgario post la milito. Estis dumviva membro de UEA sed neniam estis membro de nia klubo aŭ SEF pro tro frekventa krokodilado en tiuj organizoj. Li tamen ĝis la fino partoprenis en ĉiuj klubaj aranĝoj. Nekrologo jam publikigita en Revuo Esperanto. Li mortis la 10an de Februaro 2010.

Haldo Vedin

### Alice Johansson

Alice Johansson (1910-2010) ŝi estis honora membro de la Esperantoklubo de Norrköping kie ŝi membriĝis jam je ĝia fondiĝo 1929. Dum longa tempo klubo kasis. Je ŝia forpaso ŝi estis la plej maljuna membro de SEF, preskaŭ 100-jara. Ŝi mortis la 2an de Majo.

Haldo Vedin

### Gun Alf

Gun Alf (1919-2010) estis honora membro de la Esperantoklubo de Norrköping kie ŝi estis membro ek de sia junaĝo. Ofte distris per pianoludado dum la klubaj kunvenoj. Ŝi estis la unua oficiala Lucio de la urbo Norrköping. Ŝi mortis la 24an de Aŭgusto 2010.

Haldo Vedin

# La oktobra renkontiĝo en Norrköping

Jam antaŭ kelkaj jaroj mi ricevis proponojn de divesaj membroj ke ni aranĝu similan renkontiĝon je tiu en Jönköping antaŭ 10 jaroj. En Borlänge la renkontiĝo komencis per interparolo kaj grupa laboro pri la organiza strukturo en la sveda esperantomovado. En Lesjöfors ĉi-jare klare montriĝis ke la nuna SEF-organizaĵo kaj precipe ĝia statuto ne bone funkcias kaj ne



*Bengt Åradsson, prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio gvidas la renkontiĝon.*

*Foto: Olof Pettersson*

plenumas sian taskon. Plej forte la partoprenantoj kaj membroj postulas pli individuan demokration. Jam de longe ni parolas pri la malefika uzo de homaj fortoj nur por plenigi diversajn estrarojn. Simile ni povas daŭrigi kaj listigi problemojn por preparoli la nunan situacion.

La renkontiĝo en Norrköping estis renkontiĝo de interesuloj de la sveda esperantomovado kaj neniue decidkapabla kunveno de iu organizaĵo. Ĉirakŭ 35 personoj venis al Norrköping kaj partoprenis en la interparolado. La programo estis iom skiza por ebligi ĝin formiĝi laŭ la intereso de la partoprenantoj kaj la evoluo de la renkontiĝo. La parolado okazis kaj en ĉetablaj grupoj kaj plengrupe. Je la fino mezgrandaj grupoj pridiskutis apartajn temojn kiujn oni prezentos kaj rete kaj en La Espero. Ĉu tia renkontiĝo povas havi konkretajn rezultojn? Laŭ

mi kaj jes kaj ne. La renkontiĝo proponis laborvojon kaj direkton kaj donis ideojn. La SEF-estraro en sia posta kunsido pritraktis tiujn kaj donis al si mem taskojn laŭ kelkaj proponoj. Alia rezulto estas ke post du semajnoj la renkontiĝo kaj ĝia temo en retaj diskutejoj ankoraŭ estas vivaj. Do mi konkludas ke tiu renkontiĝo diversmaniere plivigligis plurajn esperantajn labor-emulojn. Kaj tio estas grava rezulto.

Multaj el la opinioj kaj ideoj, kiuj aperis dum la renkontiĝo, centriĝis pri ia nacia organizaĵo kiu servu la konkretan lokan kaj individuan/kluban laboron. Plejmulton de tiu servo oni povas efike aranĝi rete. Tiuj ideoj formas bazon por nia daŭra laboro.

Iom malagrabla estis la konflikto pri laborlingvo kaj mi volas aldoni kelkajn personajn rimarkojn. Je la komenco de la renkontiĝo ni decidis ke la sveda lingvo estas la plej taŭga por tiu ĉi renkontiĝo pro sia tipo kaj celo. Ni pli malpli vigle, facile, nuancplene kaj publike povas esprimi niajn ideojn kaj opiniojn en nia gepatra lingvo, sed por la plejmulto estas multe pli malfacile esprimi tion en alia lingvo, precipe publike. Tiam eblas ke la lingvo fariĝas barilo. Mi intencis por la kunveno in Norrköping kiel eble plej multe eviti ke iu pro malcerteco kaj embaraso ne esprimu sin, kontraŭe, havi kiom eble plej multajn opiniojn kaj ideojn elparolatajn. Laŭ mi la ideoj de la ĉeestantoj estis tiel gravaj ke ne valoris la risko ke ili perdiĝu. Do kosto kontraŭ gajno. Tial la propono ke la sveda estu la laborlingvo kaj la kunveno decidis tiel. Laŭ mi strange ke tiu demokrata decido ne estis akceptita de ĉiuj.

Mia konkludo tamen daŭre estas, ke ni faris gravan paŝon por estonta ŝanĝo. La estraro de SEF decidis daŭrigi laŭ kelkaj proponoj kaj ankaŭ preparos proponojn al la sekvonta jarkunveno. Ni ankaŭ ŝatus iel

aranĝi similan aŭtunajn renkontiĝojn kaj inviti ĉiujn interesulojn ne grave ĉu membro aŭ ne membro de iu organizaĵo. Ni kune devas daŭre labori por pli taŭga organiza strukturo en Svedio. Iu ŝanĝo vole/nevole okazos kaj mi preferas ke ni mem influu tiun ŝanĝon. En tiu aspekto mi bedaŭras la sintenon esprimitan de kelkaj junuloj, ĉar pli bone se ni laboras en simila direkto kun kunigitaj fortoj ol malproksime diversdirekte. Diversaj ideoj kaj opinioj sub sama tegmento estas viglaga kaj kreiva.

Ĝen kelkaj konkretaj punktoj kaj ideoj kiuj estiĝis dum kaj post la renkontiĝo, kiujn la nacia organizaĵo devas plenumi (kolektitaj el diversaj fontoj/personoj):

- \* esti jura persono kaj gardi gravajn nomojn kaj komercajn markojn
- \* esti kontaktpunkto por kaj esperantistoj kaj al la ĉirkaŭa socio kaj interesuloj
- \* zorgi pri komunaj monrimedoj kaj kunfinanci evoluigajn projektojn
- \* reprezentantigi kaj subteni personojn kiu laboras en la nomo de la organizaĵo
- \* provizi reklamajn ŝablonojn, grafikaĵojn kaj materiojn por lokaj agadoj
- \* prizorgi fizikan adreson, ie en Svedio
- \* eldonu La Espero-n parte elektronike

Konkretajn proponojn kaj finajn decidojn pri kio ajn, ĉu ŝanĝo de statuto, ĉu eldoni nian gazeton alimaniere, ni devas fari dum nia jarkunsido. Kaj ne sufiĉos unu jarkunsido. La laboro daŭros plurjare. Sed ĉiu vojo ko-mencas per la unua paŝo kaj dumvoje ni havos multajn kaŭzojn kaj espereble ankaŭ eblecojn pritrakti kaj diskuti diversajn proponojn kaj farendajojn por fari nian movadon pli taŭgan por la 21a jarcento.

Bengt Åradsson

## MOVADA STRUKTURO

### MER FRÅN NORRKÖPINGS- MÖTET

Material från de andra gruppernas diskussioner kommer i nästa nummer av La Espero.

## Anteckningar från gruppdiskussion vid mötet i Norrköping 10 okt 2010

### Grupp 2: "Organisera"

Gruppen fick i uppdrag att diskutera hur den svenska esperantorörelsen bör vara organiserad. Olika synpunkter framkom i gruppen, vilka sammanfattades och presenterades i form av 9 punkter:



Norrköpingsmötet. Foto: Olof Pettersson.

#### 1. Minska administrativt arbete

Gruppen var överens om att det är viktigt att vår tid och engagemang i så begränsad utsträckning som möjligt ska behöva ägnas åt internt administrativt arbete.

Gruppen såg fördelar med en omorganisation där dagens ideella esperantoorganisationer samverkar inom ramen för en organisation. Detta för att minska det interna byråkratiarbetet, öka svenska esperantisters möjligheter till samarbete och därmed kvalitén på vårt arbete, spara pengar samt ge ett större avtryck på omvärlden.

Gruppen diskuterade detta förslaget som har framförts av Sten Svenonius om att bjuda in de ideella organisationerna att bli sektioner inom en gemensam organisation, SEF. Det handlar om Esperantoinstitutet, ILEI.se, KELI och SAT. Gruppen tog inte ställning till förslaget.

#### 2. Utgå från behov

De administrativa funktioner vi har ska fylla ett behov hos esperantister/den svenska esperantorörelsen.

#### 3. Förbättra internt informationsflöde

Det är viktigt att det är enkelt – för de esperantister/medlemmar som vill – att ta del av information om aktuella händelser m.m.

#### 4. Lätt för icke-medlemmar att samarbeta/att ta del av information

En viktig funktion för SEF/nationell organisation är att vara en kontaktpunkt för såväl medlemmar som icke-medlemmar. Det ska vara enkelt att hitta

#### 6. Gemensam virtuell mötesplats för att underlätta vägen in i Esperantio

Den som söker efter esperanto/esperantister i Sverige ska hitta en mötesplats/kontaktpunkt och därifrån kunna hitta vidare till ev. lokal klubb, info om studier, aktuella händelser osv.

#### 7. Skapa möjligheter för ett virtuellt diskussionsforum

Gruppen diskuterade vilket forum detta bör vara, men lämnade frågan öppen tills vidare. Konferensen gav senare en arbetsgrupp bestående av Kaisa, Anita och Bengt-Olof i uppdrag att undersöka frågan vidare och återkomma med förslag på lämpligt forum.

#### 8. SEF bör starta förändringsarbetet

Gruppen menade att SEF är en naturlig initiativtagare till förändringsarbetet.

#### 9. Definiera medlemskap/avgift

Kring medlemskap/avgift fanns olika synpunkter i gruppen. En synpunkt var att SEF (och UEA) behöver betalande medlemmar för att fungera och ha framtida livskraft. En annan synpunkt var att många esperantister – särskilt yngre – inte ser någon anledning att betala medlemsavgift i en nationell organisation och att rörelsen behöver människor snarare än pengar. Exempel på detta är både SEJU och Hernusando Esperantista Klubo som ser fördelar i att inte behöva administrera medlemsavgifter, samtidigt som man enkelt kommer i kontakt med medlemmarna.

En möjlig väg framåt är att skapa olika kategorier av "medlemskap", där ej betalande bör få tillgång till mötesplatser och möjlighet att ta del i arbetet för esperanto, medan betalande exempelvis får del av La Espero och rösträtt.

Vidare diskuterades huruvida La Espero bör finnas både på papper och elektroniskt. Det elektroniska alternativet innebär bl a en ekonomisk besparing. Gruppen tog inte ställning i denna fråga.

Karin Nordström

ingångar till esperantorörelsen i Sverige.

#### 5. Stimulera decentraliserade initiativ

Som ideellt baserad rörelse är det viktigt att det är öppet för lokala/decentraliserade initiativ av olika slag. Det kan gälla såväl kurser och arrangemang som information m.m. Många bra initiativ inom rörelsen har tagits och genomförts av enskilda esperantister och frihet och flexibilitet måste känneteckna SEF.



# Manifesto de Oranĝa Renkontiĝo por Norrköping

Post semajnfino plena de bona manĝo, vivanta muziko, danco, ludoj, ekskursoj, kaj senkompare mirinda senco de kuneco kadre de la Oranĝa Renkontiĝo en Hernusando, okazis dimanĉon posttagmeze diskuto pri la tiel-nomata krizo pri kiu temas la jena renkontiĝo.

Kiel rezulton la diskuto naskis du listojn kun konkretaj proponoj. Indas ĉi tie memori ke partoprenis la diskuton ĉirkaŭ dudek personoj, kaj ke la nivelo de interkonsento estis relative alta por tiuspeca diskuto. Tial ĝi iusence formas opiniaron de granda parto de junaj svedaj esperantistoj.

La unua listo enhavas aferojn kiujn enhavu la nacia organizo. Stariĝis la demando “kio estas grava? kion havu la nacia esperantoorganizo post dek jaroj?”, kaj rezultis la jena listo:

- Kontaktejo por svedaj esperantistoj. Simple plejeble malferma – interreta kaj eble libra – listigo de ĉiuj kiuj agas por kaj interesiĝas pri Esperanto.

- Reprezentanto por eksteraj rilatoj (la sveda ŝtato, amas-komunikiloj, aliaj esperantoorganizo, ktp.) Imagu ke vi estas komencanto aŭ interesulo kiu volas kontakti “Esperanton en Svedio”. Vi levas la telefonon kaj vokas – kiun? Tiun rolon havu la reprezentanto.

- Amuzaj internaciaj renkontiĝoj. Guste tie montriĝas la celo de esperanto: influi homo al homo. Ankaŭ aktiviĝas ĉiuj tri niveloj: loka, kiu aranĝas eventon; nacia, kiu informas kaj apogas mone kaj sperte; inter-



*Robin Rönnlund argumentas en Norrköping.*

*Foto: Olof Pettersson.*

nacia, kiu kontribuas per gastoj, temoj, kaj endigas la uzon de la lingvo.

- Enirejo al Esperanto por komencantoj. Plena de informoj pri kie lerni pli, kion legi ktp. Tio ja ekzistas en diversaj disaj formoj jam hodiaŭ, sed povus esti farite multe pli klare, kaj en centra, videbla loko.

- Metiejo por informiloj. Gravas havi centran lokon kun bonkvalita materialo por informi pri Esperanto.

- Informoj pri fondusoj. Estas hodiaŭ manko de kontakto inter agemuloj kaj monaj rimedoj. Grandaj monsumoj restas neuzitaj simple pro manko de tiuj informoj.

La dua listo enhavas aferojn kiujn evitu la nacia organizo. Stariĝis la demando “kio ne estas grava? pri kio ne okupiĝu la esperantoorganizo?”.

Rezultis la jena listo:

- Landa papera gazeto. Pasinta estas la tempo kiam la valoro havi nacian gazeton surpapere superis la laboron redakti kaj disvastigi ĝin.

- Fizika ejo. Oni ne plu bezonas centran fizikan lokon por la nacia organizo. Oni ja pro strukturaj kialoj bezonas adreŝon, sed tio estas alia afero.

- Membrokotizo. Pasinta estas la tempo kiam la valoro doni de membroj ĉiujare monon por apogi la landan asocion superis la laboron rilatan al la kolektado mem.

- Filatelaĵoj. Ne foruzu monon por produkti diversajn Esperanto-markitajn tasojn, kristalojn, butonojn, skibilojn, ktp.

Uzu monon por rekte atingi homojn kaj tuŝu la iliajn korojn pere de la mesaĝo de Esperanto, kaj la beleco de la lingvo mem. Esperanto ne estas taso.

- Paperlibra eldonejo. Pasinta estas la tempo kiam la valoro de havi propran eldonejon por esperantoliteraturo superis la strukturan pezon de subteni ĝin. Nuntempe ekzistas multe pli fajnaj manieroj eldoni librojn kaj kajerojn, senbezone de propra eldonejo.

Krom tiuj du listoj kaj la diskuto ĉirkaŭ ili, estis evidente en la etoso kaj en la vizaĝoj de la partoprenantoj, ke se ie ekzistas krizo aŭ duboj pri la estonteco de Esperanto en Svedio, almenaŭ ne ekzistas ĝi en Hernusando, ĉe la junuloj, aŭ dum la Oranĝa Renkontiĝo. Ni preferas ne fokusi tro multe je malnovaj ne plu ĉiam celhavaj organizaj strukturoj, sed anstataŭe direkti la atenton al kutima verdula frazo, kiu ankaŭ povas funkcii kiel taŭga agokrio por esperantistoj: PENSANTE TUTMONDE, AGU SURLOKE.

Ni kune konstruu nacian organizon kiu ebligas tion.

**Malferma letero de Seju al la renkontiĝo en Norrköping**

Ni en Seju-estraro volas per tiu ĉi mesaĝo komuniki siajn opiniojn pri la nomita “krizo” en la sveda Esperanto-movado. La jenaj vortoj spegulas la komunajn vidpunktojn de la estraro kaj ni celas esti konstrueman en tiu ĉi debato kvankam ni ne tute agnoskas ties komencpunkton.



Kio unue frapas nin, legintaj la dissenditan inviton al tiu ĉi renkontiĝo, estas ke la diskuto pri "krizo" ŝajne pleje temas pri SEF kaj ties problemoj pri membrokvanto kaj ne pri la intereso pri Esperanto. Laŭ ni, organizo en si mem ne havas valoron – ĝi ekzistu pro bezono, ne pro si mem. Se la diskuto temus pri supoza "senintereso pri Esperanto", ni ja havus problemojn sed neniu en la Seju-estraro kredas tion. Ne estas senintereso pri Esperanto, sed verŝajne senintereso pri organizoj.

La demando do estu: Kial SEF (kaj rilate ankaŭ UEA) ne allogas membrojn? Tiu diskuto estas la inda, sed la respondo sufiĉe evidenta: ĉar ĝi ne plenumas bezonon por esperantistoj. Se ĉiuj esperantistoj kaj samideanoj bezonus membriĝon en SEF, la plejparto de ili ja estus membroj. Bona ekzemplo pri la problemo estas la kazo pri Hernusanda Esperantista Klubo (HEK), hodiaŭ la plej rapide kreskanta kaj influa esperantoklubo en Svedio. Ĝi ne apartenas al SEF – kaj tio ĉi estas informo rekte de la hernusanda estraro – ĉar SEF malsukcesis komuniki al HEK kial ties membroj taŭge profitus je membriĝo en la landa orga-nizo.

"Membriĝo nur kostus al la membroj ege pli ol la kluba jarkotizo kaj redonus malmulton" estis la konkludo de HEK-estraro. Ĉu tio damaĝis la klubon? Ĉu la senmembrecio en SEF baris al ĝia evoluo? Kvankam ĝi ne apartenas al SEF

ne UEA ĝi kreskas kaj ni povas hodiaŭ konkludi ke Hernusando iĝis unu el la ĉefnodoj de Esperantio en norda Eŭropo.

Do, kion ni proponas? Plej grava por ni estas Esperanto – ni do vivtenu la fajron, ne la organizon. Ni plu volas niajn organizon, historio ankaŭ estas grava por ni, sed ni formu ilin laŭ la membroj, ne male. Ni devas starigi al ni la demandon "Kiel povas nia organizo servi al siaj membroj?" kaj ne nur fikse gapi la nombron de la membrokvanto.

Esperanto daŭre interesas homojn, pri tio ni certas – daŭre venas interesitoj kiuj demandas nin pri kion ni faras kaj kiel ni agadas, sed ni ŝajne malsukcesas teni ilin al ni kaj tio ne estas stranga, ĉu ne? Imagu, la invitletero al tiu ĉi renkontiĝo kaj la plejparto de la diskuto rilata al ĝi estis tute en la sveda. Se eĉ ne la esperantistoj uzas Esperanton, kiu do?

Edmond Privat antaŭ preskaŭ cent jaroj diris ion similan kiel "Ne kverelu pri malplena skatolo, simple plenu ĝin!" kaj ĝi daŭre validas.

## MOVADA STRUKTURO

### Strategio por ekspansio

La objekto de la diskuto en Norrköping estis trovi rimedon por turni "la alarman evoluon de la organizita e-movado" en pli favoran direkton, kaj ekas en tio jam nun ebla sukceso.

Tio tamen estas periferia problemo, kiu prefere ne fortiru la atenton de la ĉefa afero nomebla ankaŭ pravelo, nome la stato de esperanto en la sveda socio. Feliĉe tiu stato ne estas alarma nek kriza. Ĝi tamen ne estas kontentiga. Esperanto estas neglektata en la neesperantistaj politikaj, kulturaj kaj pedagogiaj rondoj kaj debatoj. Neniu universitata katedro kontinue okupas sin pri esperanto. Esperanto estas tro malofte uzata por neesperantismaj celoj.

Por atingi pli kontentigan staton necesas formi esperantistaron kvalite pli superan ol ni mem estas, kaj en la nuna situacio tio povas realiĝi nur kun samtempa kvanta kresko. Jen strategio por tio:

Kiam homoj elektas, kiun lingvon sendevige lerni, ili elektas laŭ siaj intereso – la vorto intereso interpretata en ĝia plej vasta senco. Oni ankaŭ povas paroli pri motivoj en la senco de tio, kio kaŭzas moviĝon, psikan aŭ fizikan. Ĉiu motivo, kiu movas unu personon al lerno de esperanto, povas ĉe alia efiki tute inverse. Facila lingvo?! – Ho, ĝin mi volas lerni! Facila lingvo?! – Ha, facila lingvo ne povas ĉion esprimi! La ekzemploj povas multiĝi. Tial oni devas adapti la argumentojn al la intereso de la celataj personoj. Kaj en ĉiu kazo, kiam tio eblas, tute ne argumenti – nur montri kiel bele la varo kongruas kun la intereso de la kliento.

Kiam Zamenhof dissendis sian unuan libron, li antaŭe identigis merkatiĉon de lingvointeresuloj. Ni scias tion, ĉar lia libro apenaŭ estus komprenebla kaj uzebla por tiuj, kiuj ne havus pli ol ordinaran lingvokapablon. Ni ankaŭ scias, ke li estis tre suk-

cesa. Se li ne estus, esperanto nun ne ekzistus.

Ne estis hazardo, ke la tradukanto de lia unua libro al la sveda estis studento kun pasia intereso por la franca lingvo (li poste fariĝis franclingva verkisto) kaj ke la unua esperanta klubo en Svedio konsistis el studentoj plejparte pri teologio. De la tiamaj studentoj de teologio oni postulis almenaŭ studojn de la antikvaj greka, latina kaj hebrea krom de modernaj lingvoj.

La resursoj ankaŭ nun estas limigitaj. Tial necesas ankaŭ nun koncentri ilin je merkatiĉo aŭ celgrupo, kie la grado de efiko estas plej granda.

La motivojn lerni esperanton oni povas sortimentari en du kompleksojn: 1) motivoj plibonigi la mondon 2) motivoj riĉigi sian propran vivon. Subsekcio de la dua komplekso estas pasio por lingvistado. Tion Zamenhof komprenis kaj uzis ĝin kiel kaptofadenon por poste vivigi kaj vigligi ankaŭ aliajn motivojn. Fakte tiuj aliaj motivoj vigliĝis per si mem, ĉar ĉe preskaŭ neniu homoj nur unu motivo validas.

Por lingvopasiuloj ni bezonas nenion alian fari, ol montri nin mem, nian lingvon kaj nian komunumon. Tio estas metodo, kiu prezentas la plej altan gradon de efikeco. La lingvopasiuloj ne bezonas lernolibrojn. Ili ne bezonas kursojn. Ili bezonas vortarojn, kaj ilin Eldona Societo Esperanto povas vendi al ili. Ili bezonas librojn kaj gazetojn kaj ilin la libroservo de UEA povas provizi. Ili bezonas stimulon kaj praktikon kaj tion interreto kaj internaciaj renkontiĝoj povas liveri.

Ĉio, kion la svedaj esperantistoj bezonas fari, estas eksponi al ili (krom si mem) interesajn (prefere vendeblajn) tekstojn de simila speco, kia estis la unua libro de Zamenhof, ĉar eĉ se la "mondo" ŝanĝiĝis, la baza psikologio de homoj ne ŝanĝiĝis. Simila, sed kun unu grava diferenco: kie Zamenhof verkis pri siaj esperoj rilate esperanton, ni povas jam skribi la historion, literaturhistorion kaj precipe la idehistorion de Esperantio. Per

*Daŭrigo sur paĝo 11.*

## Estraro de la Akademio

43 akademianoj voĉdonis por elekti la estraron kaj la direktorojn de la Sekcioj kaj Komisionoj de la Akademio de Esperanto.

Kiel estraranoj estis elektitaj:  
John Wells, prezidanto  
Probal Dasgupta, vicprezidanto  
Brian Moon, vicprezidanto  
Renato Corsetti, sekretario

Kiel direktoroj estis elektitaj:  
Christer Kiselman, Faka Lingvo  
Otto Prytz, Gramatiko  
Bertilo Wennergren, Ĝenerala Vortaro

Marc Bavant, Kontrolado de lerniloj

Alexander Shlafer, Lingva Konsultejo

Paul Gubbins, Literaturo

Probal Dasgupta, Prononco

Carlo Minnaja, Komisiono Historio de AdE

## Junulara jaro

La antaŭa Estraro de UEA decidis dediĉi la temon de la 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago (23-30 julio 2011) al la Internacia Junulara Jaro, kiu komenciĝis en la ĉi-jara Internacia Junulara Tago la 12-an de aŭgusto kaj daŭros ĝis la sama tago en 2011. La nova Estraro konfirmis tion kaj elektis kiel la vortumon de la temo "Dialogo kaj interkompreno". Per tiu vortelekto la Estraro kundividas la ideon de Unuiĝintaj Nacioj, kiu volas utiligi la Junularan Jaron por antaŭenigi dialogon inter junaj homoj trans ĉiuj limoj, ankaŭ trans generaciaj limoj.

La 96-a UK okazos do preskaŭ ĉe la fino de la Internacia Junulara Jaro, sed la Estraro de UEA instigas esperantistojn al vasta diskuto pri la kongresa temo jam pli frue. La revuo "Esperanto" k.a. eldonaĵoj kaj retaj forumoj de UEA estos malfermaj al kontribuaĵoj pri la temo. Nature la Estraro de UEA atendas ankaŭ aktivan

engaĝiĝon de TEJO, kun kiu ĝi proksime kunlaboros pri la planado de la tema traktado dum la UK en Kopenhago.

## Belartaj konkursoj de UEA

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 62-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 96-a Universala Kongreso en Kopenhago. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK nek al membreco en UEA. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de la branĉoj Infanlibro, Filmo kaj Kanto. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Validas krome jenaj kondiĉoj:

*Poezio:* maksimuma longo ne fiksita.

*Prozo:* maksimuma longo 200 x 65 karakteroj (kvino da paĝoj).

*Teatraĵoj:* maksimuma longo ne fiksita.

*Eseo:* teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo "Dialogo kaj interkompreno", proksimuma longo 400 x 65 karakteroj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas "Luigi Minnaja".

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2010. Unu premio.

*Filmo kaj Kanto:* La juĝantoj priatentos la produktojn aperantajn sur la Esperanto-scenejo en tiuj du branĉoj kaj, se ili opinias iun verkon valora, ili atribuos la koncernajn premiojn. Aŭtoroj povas ankaŭ mem proponi siajn verkojn (vd. la regularon). Se temas pri jam publikigitaj verkoj, la publikigo devis okazi en 2010.

Ĉiujn konkursaĵojn -- en unu ekzemplero, escepte de tiuj por la branĉo Infanlibro, kiujn oni devas havigi en kvar ekzempleroj -- oni sendu al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma,

Italo aŭ prefere rete al: michela.lipari@tiscali.it, indikante pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. La absoluta limdato por la ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto 2011.

Premioj: unua premio 240 EUR, dua premio 168 EUR, tria premio 96 EUR; Nova Talento 168 EUR; Infanlibro de la Jaro 504 EUR.

## Listo de cent tradukoj

"Majstro kaj Margarita" de Miĥail Bulgakov, en la traduko de Sergio Pokrovskij, estas la plej leginda tradukita beletraĵo en Esperanto. Tion povis konkludi Edmund Grimley-Evans, dum li kompilis sian liston de la cent plej legindaj tradukoj en Esperanto. La prijuĝo kompreneble estas subjektiva, sed la supererigo en la kvanto de rekomendoj estis tre klara, diras Edmund Grimley-Evans. Sed kial kompili tian liston? "La celo estas instigi homojn legi la librojn. Ŝajnas al mi, ke esperantistoj ne sufiĉe aprezas sian tradukliteraturon, kaj ĉi tiu eta iniciato eble instigos kelkajn homojn pli interesiĝi pri ĝi", diras Edmund Grimley-Evans en intervjuo de Libera Folio.

La plej rekomendita prozaĵo estis "La majstro kaj Margarita" (fakte kun granda margeno, kvankam ĝia tradukinto estis tro modesta por mem rekomendi ĝin). Sekvis ĝin: "Cent jaroj da soleco", "La faraono", "La metamorfozo", "Kvin virinoj de amoro", "Don Quijote". Jen kvin lingvoj reprezentataj en la unuaj ses. La ses plej rekomenditaj versaĵoj estis: "Kalevala", "Sinjoro Tadeo", "Cigana romanaro", "Hamleto" (tr. Zamenhof), "Aniario", "Floroj de l' malbono".

www.liberafolio.org

## Bliv medlem i UEA 2011

UEA är den största organisationen i världen för esperantister.

Den behöver ditt stöd för att allt bättre uppfylla sina viktiga uppgifter att

- sprida esperanto
  - verka för en lösning på språkproblemet i internationella sammanhang
  - underlätta all sorts kommunikation mellan människor oavsett ras, religion eller politisk åsikt
  - därmed öka förståelsen mellan folk och länder
- UEA ger ut flera esperantotidningar bl.a. Revuo Esperanto och har en omfattande bokförsäljning. Som direktmedlem får du köpa böcker från UEA:s bokservice med 10 % rabatt 2 gånger om året, och ifall du är MA-medlem får du rabatten vid obegränsat antal köp. UEA anordnar även varje år en stor internationell världskongress för att nämna några verksamhetsområden.

För din egen del betyder det, att du får UEA:s årsbok med namn och adresser på delegater i hundratalet länder, och, om du är MA-medlem, får du tidningen Esperanto, som ger dig värdefull information om vad, som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet (MA eller MJ) dig rätt till betydligt lägre kongressavgift.

MJ-medlemmar kan läsa tidningen Esperanto på nätet, och MG-medlemmar kan få en informationsbulletin på nätet, om UEA får mailadressen.

Du betalar avgiften genom att sätta in pengarna på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto. Ange på talongen vad pengarna avser. Upplysningar: Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby, tel. 0415-50152, bertil.andreasson@horby.mail.telia.com

Avgifterna för år 2011 är följande:

MA Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man auto-matiskt medlem även i TEJO och får tidningen Kontakto: 600 kr

MJ Direktmedlem med årsbok. I övrigt se ovan! 240kr

MG Direktmedlem med "Gvidlibro". Ger inte nersatt kongressavgift: 95 kr

SZ Avgift för "Societo Zamenhof", särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA: 1 200 kr

PT "Patrono de TEJO", får tidningen Kontakto: 720 kr

DM "Dumviva membro" betalar för hela livet. Får årsboken och tidningen Esperanto: 15 000 kr

DMJ "Dumviva membro kun jarlibro" betalar för hela livet. Får årsboken: 6 000kr

Dpat "Dumviva Patrono", betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och blir därtill ständigt medlem i "Societo Zamenhof". 1 50 000 kr

DPT "Dumviva Patrono de TEJO" betalar för hela livet och får tidningen Kontakto. 18 000 kr

## TRA LA MONDO

### Granda fajro en Bona Espero

Ampleksa incendio detruis grandan parton de la teritorio de Bona Espero, esperantista orfejo en Brazilo. La granda grundofajro trafis la regionon en la tria semajno de septembro, sed ne atingis la ĉefajn konstruaĵojn de Bona Espero.

En letero sendita al subtenantoj de la projekto, la esperantistaj estroj de la orfejo, Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, rakontas pri la okazaĵo:

- Ni saviĝis el grandega fajro, kiu alvenis fortege nokte de la nordo. Se estus dumtage, oni pli sekure povus batali kontraŭ la flamoj, sed nokte ĉiuj bestoj, ĉefe la serpentoj fuĝas de la fajro rekte al la homoj, kiuj volas kontraŭbatali... Tamen ni sukcesis defendi niajn domojn kaj legomejojn. Ĉe la lago ĉio estas nigra, kaj eĉ brulis la elektra drato kaj iom da tuboj.

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

*Daŭrigo de paĝo 9:  
Strategio por ekspansio.*

tio lasta ni jam eniras la taskon atingi la merkatiĉon de pli-bonigantoj de l' mondo.

Kaj inter diro kaj faro ne estas baro nek maro. Kiuj komprenas la eblecojn, simple eksidu sur siaj postaĵoj kaj pripensu: Kiel ni povos plej efike atingi tiun merkatiĉon de lingvopasiuloj? Kaj en la sekva stadio, rikoltante sur tiu kampo tiom kiom eblas, demandi al si, kiun celgrupon poste elekti kaj kiel prepari sin por ĝi.

Dum realiĝo de tia strategio kreiĝus duoblegajna situacio. La malnovaj organizoj, al kiuj multaj havas sentimentajn ligojn, povus senperturbe daŭrigi siajn kutimajn aktivecojn, kaj samtempe aperus novaj esperantistoj, riĉigantoj kaj konsumantoj de esperanto, kiuj pretus uzi esperanton, ne kiel helplingvon, sed kiel ajn lingvon. Kiel tiuj novaj esperantouzantoj volos organizi sin, nu, tio estos ilia afero, ne la nia. Kial ni provu enkapti ilin en obsoletajn organizojn? Ni ne estas iliaj kuratoroj. Nia tasko estas eviti, ke esperanto maltrafos la pracon kaj dronos kun sia propra movado.

Kiel ajn ili organizos sin, ili kreas sekurecan reton, kiu transvivigos esperanton al novaj generacioj, kio ajn okazos al la nunaj kotizdependaj organizoj.

Bertil Nilsson

**ĈU ANKAŬ VI VOLAS IĜI DELEGITO DE UEA?**

Se vi jam estas membro de UEA dum unu jaro kaj plenumas la ceterajn devojn, vi povas iĝi Delegito, Vicdelegito, Junulara Delegito aŭ Faka Delegito de ĝia Delegita Reto.

Plenigu la respondilon en la Reto Jarlibro aŭ elŝutu tiun ĉe [www.uea.org/asisto.html](http://www.uea.org/asisto.html), plenigu ĝin kaj sendu al via ĉefdelegito. Nur se mankas ĉefdelegito en via lando, sendu la plenigitan respondilon al la Centra Oficejo.

**ALIĜU AL NIA RETO!**

## Kiu konas Tiberio Morariu?

Mi estas Katalin Kováts, la redaktoro de [www.edukado.net](http://www.edukado.net), eble vi konas mian nomon.

Por iu tre grava artikolo mi bezonas informojn pri Tiberio Morariu, kies ĉefaj agadoj disvolviĝis en Svedio. Mi tre malmulte trovas en la reto...

Li forpasis en 1987 en Stokholmo, almenaŭ tiam devis aperi pri li nekrologo, ĉu ne?

Ĉu vi scias ĉu vivas ankoraŭ parencoj, edzino, la filino? Kie (i)li loĝis? Sed bonevnis kiu ajn informoj, foto. Eble iu konis li persone, havas memoraĵojn, anekdotojn, opinion.

Necesus ankaŭ foto por mia Panteono: [http://edukado.net/biblioteko/panteono?mont\\_rirezulton=1](http://edukado.net/biblioteko/panteono?mont_rirezulton=1)

Katalin Kovats  
katalin.kovats@gmail.com



## Kallelse till årsmöte på Esperanto-Gården

Medlemmar och andra intresserade kallas till årsmöte i Esperanto-Gården ek. i Lesjöfors, lördagen den 8 januari 2011 kl. 14.00.

Förutom sedvanliga årsmötesaktiviteter, kommer verksamheten på gården under 2011 och framöver att diskuteras.

Det är därför viktigt att alla som har ideer eller har möjlighet att hjälpa till kommer.

Den som önskar övernattnings i samband med årsmötet kan ringa 0590-30909 för bokning.

Styrelsen

## Esperanto-Gården i Lesjöfors behöver din hjälp

Esperanto-Gården ägs av esperantister sen 1995 och drivs som vandrarhem och kursgård. Dessutom kan esperantoföreningar utnyttja gården för konferenser, kurser, läger och möten. Där finns bl.a. ett stort Esperantobibliotek. (Se för övrigt: <http://www.esperanto.se/medlem/eogarden/>)

Senaste året har vi dock tappat en del regelbundna inkomster. Främst genom att Migrationsverket slutade hyra in sig på gården för svenskakurser och vi har inte fått någon annan hyresgäst. Svenska Rallyt har brukat ge en säker inkomst i februari men 2009 gick det på andra ställen i Värmland. I vinter kommer det tillbaka till Lesjöfors. Gården är dessutom av akut behov av underhåll.

Föreningen behöver därför ditt ekonomiska stöd och bidrag för att förstärka likviditeten och på ett säkert sätt kunna fortsätta verksamheten.

Bidrag till Esperanto-Gården kan ske i form av gåvor eller köp av andelar i föreningen. En andel kostar 100 kr, men det är naturligtvis önskvärt att du köper flera andelar. Gåvor eller köp av andelar kan betalas till PlusGiro: 989065-8, Esperantogården i Lesjöfors. Ange ditt namn och om det gäller gåva eller andelar. Som andelsägare har du rösträtt i föreningen. (UEA-konto: lesj-q för den som betalar via UEA.) Föreningen behöver också frivilliga krafter, främst vid aktiviteter som kurser, läger, underhåll mm. Kontakta tel. 0590-30909 om du är intresserad. Se hemsidan ovan för flera kontaktuppgifter.

/Styrelsen  
genom Hans Häglund

## Prenumerera!

SEF erbjuder sina medlemmar att prenumerera på esperantotidningar för 2010 Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på plusgiro 14 74 29 -5, SEF, specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar, som avses. Jag skickar gärna provexemplar av någon tidning, om ni hör av er.

Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos: Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby, Tel 0415-50152, [bertil.andreasson@horby.mail.telia.com](mailto:bertil.andreasson@horby.mail.telia.com)

Tidning	nr/år	pris kr
Esperanta Finnlando	6	225*
Esperanto	11	380
Esperanto en Danio	5-6	130
Femina	4	240
Heroldo	17	390
Juna Amiko(rabatt från 3 ex)	3	140(110)
Kontakto	6	230
La Jaro	1	56
La Kancerkliniko	5	250
La Ondo	11	380
La Ondo rete		125
Literatura Foiro	6	360
Litova Stelo	6	149
Monato	11	500
Monato (retversio)		300
Norvega Esperantisto	6	110
Oomoto, nur rete		senpage
<a href="http://www.oomoto.jp/esrevuo/Oo453.pdf">www.oomoto.jp/esrevuo/Oo453.pdf</a>		
Ret-Ventoj		senpage
<a href="http://www.esperanto.hu/eventoj/">www.esperanto.hu/eventoj/</a>		
Scienca Revuo	4	200
Tidningar markerade med * har inte lämnat prisuppgift för 2011		

## Grandan dankon!



Dum kelkaj jaroj Carl-Erik Ohlsson kaj Solveig Bertilsson prizorgis la presadon kaj dissendadon de La Espero. Ili faris grandan kaj fidelan laboron.

Tiu ĉi numero tamen estas la lasta kiun ili faras. Ekde 2011 la Esperanto-klubo de Helsingborg transprenos tiun laboron.

Ni volas sincere danki al Carl-Erik kaj Solveig pro ilia laboro!

Leif Nordenstorm  
Redaktoro de La Espero



# Stokholmo estas mirinda!

Kara leganto!

Ĉu vi rekonas la jenan tekston:  
 "Estis vespero, komence de majo. La parketo sur Mosebacke ankoraŭ ne estis malfermita por la publiko kaj la florbedoj ankoraŭ ne prifositaj . . ."

Jes, la traduko de la libro de August Strindberg, "La ruĝa ĉambro" komenciĝas tiel, tradukite de Lizzie Morariu. En majo 2011, sed meze de majo, la 14-15 majo, svedaj esperantistoj renkontiĝos en Stokholmo por jarkongreso.

La nuna urbo estas rekonebla en la priskribo de Strindberg, sed multo ŝanĝiĝis dum la jaroj. La moderna Stokholmo estas plena de muzeoj, butikoj, oficejoj, trafiko. La boatoj kiuj veturigas turistojn inter la insuloj estas aliaj, pli komfortaj. Skansen estas unu el la mondkonataj vidindaĵoj de la urbo.

Esperanto vivis en Stokholmo de post pli ol cent jaroj. Sveda Esperanto-Federacio havis sian ĉef-oficejon en Stokholmo ekde la komenco. Dum longa tempo tiu oficejo estis en Tegelbacken, kaj maljunaj esperantistoj daŭre povas montri en la aero de tiu placo, en kiu loko troviĝis la fenestroj de la esperanto-oficejo.

Komence ankaŭ Eldona Societo havis sian ejon en Stokholmo, ĝis kiam ĝi translokiĝis al Malmö kaj poste al Gotenburgo, por nun esti en pluraj lokoj samtempe. La redakcio de la membrorevuo La Espero ankaŭ komenciĝis en Stokholmo.

La oficejo de Sveda Esperanto-Federacio transiris al Munkbrogatan en la insulo de la malnova urbo (Gamla Stan) post la 1950-aj jaroj, kaj poste troviĝis en pluraj adresoj sinsekve, en Jungfrugatan, en Tallkrogen, en Brunngatan apud Kungsgatan, kaj nun en Vikingagatan en proksimeco de subtera stacio St Eriksplan kaj loka trajno (pendeltåg) Karlberg.

Ankaŭ la iom aĝaj klubanoj de Stokholmo konatiĝis kun diversaj adresoj en la urbo dum la jaroj. Oni kunvenis en



*Tramo en Stokholmo: Foto: Olof Pettersson.*

Luntmakargatan kaj en Tideliusgatan, kaj de periodo al periodo en la sama ejo kiel la oficejo de Sveda Esperanto-Federacio.

Dum longa tempo estis pluraj kluboj en Stokholmo, kaj ili havis komunan membrofolion "Esto", kio estas ioma vortludo kun la nomo de la urbo. Ĝi notis inter alie ankaŭ la kunvenojn de la laborista klubo de SLEA, kiu daŭre kunvenas en la hejmoj de la membroj.

En la jaro 1934, Stokholmo estis la urbo de universala kongreso, kaj poste daŭris ĝis 1980, kiam denove estis universala kongreso en Stokholmo. Sveda jarkongreso okazis ekzemple en la jubilea jaro 1987 en centra Stokholmo. La stokholma klubo kunvenas ĉiu-merkrede dum aŭtuno, vintro kaj printempo, kun variaj programeroj, kiujn oni listigas en la kluba membrofolio "Ekspreso". Ankaŭ tiu nomo estas ioma vortludo, ĉar la Esperanto-Klubo de Stockholm mallongiĝas "EKS". Membroj de la klubo nun preparas por sveda jarkunveno je la semajnfino sabato-dimanĉo 14-15 majo 2011, kun iom da programo por fruaj alvenintoj en la vendreda posttagmezo 13 majo.

Ulla Luin

Kelkaj faktoj pri Stokholmo el Vikipedio:

Stokholmo (svede Stockholm [stokolm], finne Tukholma, latine Holmia) estas la ĉefurbo de kaj plej granda municipo en Svedio. Tie rezidas la svedaj parlamento kaj estraro. Ankaŭ la reĝo oficiale rezidas tie, sed la nuna, Karolo la 16-a Gustavo, pro familiaj kialoj ekde multaj jaroj loĝas en la najbara municipo Ekerö; la svedaj reĝoj eble estas internacie plej konataj pro la fakto ke ili ĉiujare (krom la unua fojo, en 1901, kiam la tiama reĝo Oskaro la 2-a bojkotis la okazon) disdonas en Stokholmo la Nobelajn premiojn pri fiziko, kemio, medicino kaj literaturo (tiu pri paco estas disdonata en Oslo), kaj ankaŭ la Nobelmemoran premion (ne Nobelpremio) pri ekonomiko.

La koncepto urbo, kontraste al aliaj municipoj, ne plu ekzistas en sveda leĝo, krom en kombinoj kiel ĉefurbo; tamen Stokholmo denove nomas sin urbo, kvankam tio nuntempe ne havas jurajn sekvojn.

Koordinatoj: 59°20' N 18°03' O  
 Loĝantaro: 754.948 enloĝantoj (en 2002)

Areo: 188 km<sup>2</sup>

**Geografio**

Stokholmo situas ĉe la limo inter la svedaj provincoj Uppland kaj Södermanland, ĉe la punkto kie la Balta maro ricevas la akvon de la lago Mälaren. Ene de siaj nunaj limoj, la urbo inkluzivas 14 insulojn kaj 53 pontojn. Origine, la urbo konsistis nur el la insuleto nun nomata Gamla Stan (malnova urbo), sed ĝi iom post iom aneksis najbarajn municipojn.

# La akademio pri landnomoj

*Akademio de Esperanto iam publikigas dokumenton kun la nomo "Oficialaj informoj". Jen tia dokumento el 2009 kun la nomo "Listo de Rekomendataj Landnomoj", Oficialaj informo n-ro 12.*

En 1989 la Akademio de Esperanto publikigis dokumenton kun la nomo *Listo de Normaj Landnomoj (Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 9)*. Tiu ĉi *Listo de Rekomendataj Landnomoj* estas ĝisdatigita kaj reviziita versio de tiu dokumento. Tiu ĉi nova versio anstataŭas la malnovan.

Same kiel la malnova versio, tiu ĉi listo ne estas deviga. Ĝi estas rekomendo. Sed ĝi enhavas kelkajn nomojn kun landaj aŭ popolaj radikoj oficialaj aŭ eĉ Fundamentaj. Pri tiuj nomoj oni atentu speciale.

La *Listo de Rekomendataj Landnomoj* ne konsistigas oficialigon de landnomoj aŭ popolnomoj. La Akademio povas je bezono revizii kaj ĝisdatigi la liston.

La Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro, Bertilo Wennergren

Tiu ĉi *Listo de Rekomendataj Landnomoj* estis aprobita de la Akademio en Marto 2009. Vidu la Oficialajn Informojn Numero 11 - 2009 04 15.

Bv. noti, ke sendependeco de lando ne estis kriterio por enmeti landon en tiun ĉi dokumenton. La listo enhavas ĉiujn nomojn de membroŝtatoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj aldone ankaŭ la nomojn de kelkaj aliaj landoj, sed tio nenion diras pri la eventuala sendependeco de tiuj landoj. Fakte pluraj el la landoj, kiuj aperas en la listo, ne estas sendependaj, ekzemple Siberio kaj Anglujo, sed pri tiaj demandoj la Akademio de Esperanto ne alprenas starpunkton.

La Estraro de la Akademio de Esperanto interkonsente kun la

direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro.

## Du nomkategorioj

La landnomoj en Esperanto apartenas al du kategorioj: landobazaj nomoj kaj gentobazaj nomoj:

### Landobazaj nomoj

La unua kategorio estas tiu de la *landobazaj* nomoj. En tiaj nomoj ordinaro la radiko havas landan signifon, kaj oni uzas la sufikson AN por formi nomon de la landanoj. Ekzemple:

- *Kanado* *kanadanoj* (anoj/loĝantoj de la lando Kanado)
- *Andoro* *andoranoj* (anoj/loĝantoj de la lando Andoro)
- *Pakistano* *pakistananoj* (anoj/loĝantoj de la lando Pakistano)
- *Alĝerio* *alĝerianoj* (anoj/loĝantoj de la lando Alĝerio)

Iuj landobazaj nomoj estas kunmetaĵoj aŭ plurvortaĵoj. La baza radiko tamen ne nomas genton. Ekzemple:

- *Ebur-Bordo* *eburbordanoj*
- *Sud-Afriko* *sudafrikanoj*
- *Orienta Timoro* *orienttimoranoj*

En iaj okazoj la nomo estas tiel longa aŭ kompleksa, ke oni apenaŭ povas uzi AN kiel sufikson. Tiam oni devas anstataŭe uzi esprimon kun la vorto *anoj*, aŭ kun *loĝantoj* aŭ simila vorto:

- *Antigvo kaj Barbudo* *anoj de Antigvo kaj Barbudo*

Kelkaj landobazaj nomoj finiĝas je *...lando*. Tiam ordinaro *-land-* estas parto de la radiko:

- *Irlando* *irlandanoj* (la radiko estas IRLAND)
- *Nederlando* *nederlandanoj* (la radiko estas NEDERLAND)

En iaj okazoj tamen temas pri kunmetaĵo kun la Esperanta radiko LAND, sed la elemento antaŭ LAND ne estas nomo de gento:

- *Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj* *anoj de Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj*, *emirlandanoj* (emiroj ne estas gento, sed speco de regantoj)

La kategorio de landobazaj nomoj entenas la grandan plimulton de la landnomoj en Esperanto.

### Gentobazaj nomoj

La dua kategorio, la *gentobazaj* nomoj, koncernas nur malplimulton da landnomoj. (Landoj kun gentobazaj nomoj troviĝas precipe en Eŭropo, sed ankaŭ en Azio kaj Afriko.) En tiu kategorio la baza radiko nomas genton aŭ popolon. Oni ordinaro formas la nomon de la lando per la Fundamenta sufikso UJ aŭ per la neoficiala sufikso I. Ekzemple:

- *francoj* *Francujo/Francio* (la lando de la francoj)
- *japanoj* *Japanujo/Japanio* (la lando de la japanoj)

En kelkaj gentobazaj nomoj oni uzas la radikon LAND anstataŭ UJ/I, pro internacieco aŭ Esperanta tradicio:

- *poloj* *Pollando* (la lando de la poloj)
- *svisoj* *Svislando* (la lando de la svisoj)

Sed kompreneble oni povas ankaŭ en tiaj okazoj uzi UJ/I: *Polujo/Polio*, *Svisujo/Svisio*. En la ĉi-postaj listoj de rekomendataj landnomoj, la Akademio prezentas ses gentobazajn nomojn kun LAND anstataŭ UJ/I, ĉar la formoj kun LAND estas pli kutimaj por tiuj nomoj. Sed la Akademio neniel kontraŭas la respondajn formojn kun UJ/I. Inverse ankaŭ eblas ĉe tiuj landoj, por kiuj la Akademio rekomendas formon

kun UJ/I, anstataŭe uzi formojn kun LAND (*Danlando, Anglo-lando* k.s.). Sed ĝenerale estas preferinde uzi LAND tiamaniere nur kiam la rezulta formo havas Esperantan tradicion.

Por paroli pri la loĝantoj de lando kun gentobaza nomo, oni ordinare uzas la simplan popolvorton: *francoj, japanoj, poloj, svisoj* k.t.p. Sed kompreneble oni ankaŭ povas uzi la sufikson AN:

*francujanoj/francianoj, japanujanoj/japanianoj, pollandanoj, svislandanoj* k.t.p. Se oni uzas AN ĉe tiaj landnomoj, tiam oni memoru, ke oni devas aldoni AN al la landnomo, ne al la popolnomo: *francujanoj/francianoj* (ne "*francanoj*"); *pollandanoj* (ne "*polanoj*").

## Rekomendoj pri Landnomoj

Pro respekto al la tradicio, kaj en pacema spirito, ni deklaras, ke landnomo estas taŭga, se ĉiuj aŭ la granda plimulto senkonteste uzas la saman formon.

En okazo de konflikto inter du aŭ pluraj formoj por unu sama landnomo aŭ ankaŭ inter la uzo de kategorio aŭ la alia por unu sama radiko, la Akademio rekomendas preferi la plej internacian landnomon kaj tiel obei al la 15-a Regulo de la Fundamento.

La Akademio rekomendas konsideri, ke la signifo-rilatoj inter la landnomoj kaj la koncernaj landano-nomoj ĉiam estas principe la samaj, kiu ajn estas la kategorio de la landnomoj. Ekz-e, Angl-ujo / -io - Angl-oj kaj en la alia kategorio Nederland-o - Nederland-anoj. Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia "sufikso" aŭ sufikse uzata fremda vorto (-io, -(i)stano, ...), se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.

(Senŝanĝe el *Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 4, 1985.*)

Pluraj el la ŝanĝoj en tiu ĉi revizio konsistigas aplikadon de la unua kaj plej grava el la ĉiantaŭaj kvar principoj, kun speciala atento al la nuna lingvouzo.

Landnomoj rekomendataj de la Akademio de Esperanto

La ĉi-postaj listoj enhavas ĉiujn nunajn landojn, kiuj estas membroj de UN, kaj ankoraŭ kelkajn pliajn landojn (inkluzive de tri landoj, kiuj malaperis aŭ disiĝis post 1989).

**Mallongigoj:**

FdE: la radiko aperas en la Fundamento de Esperanto

80A: la (popola aŭ landnoma) radiko estis oficialigita en la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro

90A: la (popola aŭ landnoma) radiko estis oficialigita en la Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro

\*: la nomo estas gentobaza

AA: dulitera internacia landokodaĵo laŭ ISO-3166 (se tia kodaĵo ekzistas)

**Afriko**<sup>80A</sup>

Alĝerio<sup>80A</sup> DZ; Angolo AO; Benino BJ; Bocvano BW; Burkino BF; Burundo BI; Centr-Afriko CF; Ĉado TD; Ebur-Bordo CI; Egiptujo/Egiptio\* EG; Ekvatora Gvineo<sup>80A</sup> GQ; Eritreo ER; Etiopujo/Etiopio\*<sup>80A</sup> ET; Gabono GA; Gambio GM; Ganao GH; Gvineo<sup>80A</sup> GN; Gvineo-Bisaŭo<sup>80A</sup> GW; Ĝibutio DJ; Kaboverdo CV; Kameruno CM; Kenjo KE; Komoroj KM; Kongo (Demokratia Respubliko Kongo, Kongo Kinŝasa) CD; Kongo (Respubliko Kongo, Kongo Brazavila) CG; Lesoto LS; Liberio<sup>80A</sup> LR; Libio<sup>80A</sup> LY; Madagaskaro MG; Malavio MW; Malio ML; Maroko<sup>80A</sup> MA; Maŭricio MU; Maŭritanio MR; Mozambiko MZ; Namibio NA; Niĝerio NG; Niĝero NE; Ruando RW; Santomeo kaj Principeo ST; Sejŝeloj SC; Senegalo SN; Sieraleono SL; Somalujo/Somalia\* SO; Sud-Afriko ZA; Sudano<sup>80A</sup> SD; Svazilando\* SZ; Tanzanio TZ; Togolando TG; Tunizio<sup>80A</sup> TN; Ugando UG; Zambio ZM; Zimbabvo ZW.

**Ameriko**<sup>80A</sup>

Antigvo kaj Barbudo AG; Argentino AR; Bahamoj BS; Barbado BB; Belizo BZ; Bolivio<sup>80A</sup> BO; Brazilo<sup>80A</sup> BR; Ĉilio CL; Dominika Respubliko DO; Dominiko DM; Ekvadoro<sup>80A</sup> EC; Grenado GD; Gronlando GL; Gujano GY; Gvatemalo<sup>80A</sup> GT;

Haitio HT; Honduro HN; Jamajko JM; Kanado<sup>80A</sup> CA; Kolombio CO; Kostariko<sup>80A</sup> CR; Kubo<sup>80A</sup> CU; Meksiko<sup>80A</sup> MX; Nikaragvo<sup>80A</sup> NI; Panamo<sup>80A</sup> PA; Paragvajo<sup>80A</sup> PY; Peruo<sup>80A</sup> PE; Salvadoro SV; Sankta Kristoforo kaj Neviso KN; Sankta Lucio LC; Sankta Vincento kaj Grenadinoj VC; Surinamo SR; Trinidado kaj Tobago TT; Urugvajo<sup>80A</sup> UY; Usono<sup>90A</sup> US; Venezuelo<sup>80A</sup> VE.

**Azio**<sup>80A</sup>

Afganujo/Afganio\* AF; Armenujo/Armenio\*<sup>80A</sup> AM; Azerbajĝano AZ; Bangladeŝo BD; Barato (= Hindujo/Hindio\*) IN; Barejno BH; Birmo<sup>80A</sup> MM; Brunejo BN; Butano BT; Ĉinujo/Ĉinio\*<sup>90A</sup> CN; Filipinoj PH; Hindujo/Hindio\* (= Barato) IN; Indonezio ID; Irako<sup>80A</sup> IQ; Irano<sup>80A</sup> IR; Israelo<sup>90A</sup> IL; Japanujo/Japanio\*<sup>90A</sup> JP; Jemeno YE; Jordanio JO; Kamboĝo KH; Kartvelujo/Kartvelio\* GE; Kataro QA; Kazaĥujo/Kazaĥio\* KZ; Kirgizujo/Kirgizio\* KG; Kuvajto KW; Laoso LA; Libano<sup>80A</sup> LB; Malajzio MY; Maldivoj MV; Mongolujo/Mongolio\* MN; Nepalo NP; Nord-Koreujo/Nord-Koreio\* KP; Omano OM; Orienta Timoro TL; Pakistano<sup>80A</sup> PK; Rusujo/Rusio\*<sup>FdE</sup> RU; Sauda Arabujo/Sauda Arabio\*<sup>80A</sup> SA; Siberio; Singapuro SG; Sirio<sup>80A</sup> SY; Srilanko LK; Sud-Koreujo/Sud-Koreio\* KR; Taĝikujo/Taĝikio\* TJ; Tajlando TH; Tajvano TW; Turkmenujo/Turkmenio\* TM; Turkujo/Turkio\*<sup>FdE</sup> TR; Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj AE; Uzbekujo/Uzbekio\* UZ; Vjetnamujo/Vjetnamio\* VN.

**Eŭropo**<sup>FdE</sup>

Albanujo/Albanio\*<sup>80A</sup> AL; Andoro AD; Anglujo/Anglio\*<sup>FdE</sup>; Aŭstrujo/Aŭstrio\* AT; Belgujo/Belgio\*<sup>80A</sup> BE; Belorusujo/Belorusio\* BY; Bosnujo/Bosnio\* kaj Hercegovino BA; Britujo/Britio\*<sup>90A</sup> GB; Bulgarujo/Bulgario\*<sup>80A</sup> BG; Ĉeĥujo/Ĉeĥio\* CZ; Danujo/Danio\*<sup>80A</sup> DK; Estonujo/Estonio\*<sup>80A</sup> EE; Finnlando\* FI; Francujo/Francio\*<sup>FdE</sup> FR; Germanujo/Germanio\*<sup>FdE</sup> DE; Grekujo/Grekio\*<sup>80A</sup> GR; Hispanujo/Hispanio\*<sup>FdE</sup> ES; Hungarujo/Hungario\*<sup>80A</sup> HU; Irlando<sup>80A</sup> IE; Islando<sup>80A</sup> IS; Italujo/Italio\*<sup>80A</sup> IT; Kipro CY; Kosovo; Kroatujo/Kroatio\* HR; Latvujo/Latvio\*<sup>80A</sup>

LV; Lihtenŝtejno LI; Litovujo/  
Litovio\* LT; Luksemburgo LU;  
Makedonujo/Makedonio\* MK;  
Malto MT; Moldavujo/  
Moldavio\* MD; Monako MC;  
Montenegro ME; Nederlando<sup>80A</sup>  
NL; Norvegujo/Norvegio\*<sup>80A</sup> NO;  
Pollando\* PL; Portugalujo/  
Portugalio\* PT; Rumanujo/  
Rumanio\*<sup>80A</sup> RO; Rusujo/  
Rusio\*<sup>FdE</sup> RU; Sanmarino SM;  
Serbujo/Serbio\* RS; Skotlando\*;  
Slovakujo/Slovakio\* SK; Sloven-  
ujo/Slovenio\* SI; Svedujo/  
Svedio\*<sup>80A</sup> SE; Svislando\* CH;  
Turkujo/Turkio\*<sup>FdE</sup> TR; Ukrain-  
ujo/Ukrainio\* UA; Vatikano VA.

#### Oceanio

Aŭstralio<sup>80A</sup> AU; Fiĝio FJ;  
Kiribato KI; Marŝaloj MH;  
Mikronezio FM; Nauro NR; Nov-  
Zelando NZ; Palaŭo PW; Papuo-  
Nov-Gvineo PG; Salomonoj SB;  
Samoo WS; Tongo TO; Tuvalo  
TV; Vanuatuo VU.

#### Eksaj landoj

Ĉeĥoslovakujo/Ĉeĥoslovakio\*  
(Eŭropo); Jugoslavujo/Jugo-  
slavio\* (Eŭropo); Sovetio, Sovet-  
Unio (Eŭropo/Azio).

Pri la karaktero de tiu I (uzata  
post popolvortoj anstataŭ UJ)  
ekzistas diversaj opinioj. Iuj  
rigardas ĝin kiel efektivan  
sufikson (kvankam neoficialan),  
dum aliaj preferas rigardi ĝin  
kiel eron de aparta landnoma  
radiko paralela kun la responda  
popolnoma radiko. Tiuj diversaj  
analizoj ĉiuokaze ne faras  
praktikan diferencon en la  
uzado de tiaj landnomoj kiel

*Francio, Rusio, Japanio kaj Ĉinio.*  
En tiu ĉi dokumento la  
Akademio ne alprenas  
starpunkton pri tiu teoria  
demando.



Ni publikigas tiun ĉi doku-  
menton en iom mallongigita  
versio. En la kompleta doku-  
mento aperas ankaŭ listo kun  
ĉiuj landnomoj en alfabeto ordo.  
En la retejo [www.akademio-de-  
esperanto.org/](http://www.akademio-de-esperanto.org/) oni povas trovi  
tiun ĉi kaj kaj aliajn doku-  
mentojn.




## Volontuloj bezonataj

Bjalistoka Esperanto-Societo ha-  
vas oferton al ĉiuj junaj  
eŭropanoj (ne-poloj), kiuj volas  
ekde februaro-marto dediĉi 9  
monatojn al laboro en la societo,  
kadre de la programo Eŭropa  
Volontula Servo (EVS).

Restis jam nemulte da tempo  
por decidiĝi kaj deklari sin  
kandidato al la projekto. Ĉiujn  
detalojn vi trovos ĉe nia retpaĝo:  
[http://espero.bialystok.pl/eo/  
article,401,12,1.html](http://espero.bialystok.pl/eo/article,401,12,1.html)

## VIZAĜOJ Novelaro 2000-2009



### Ĝi ĵus aperis!

Sten Johansson: La Esperanta  
novelarto dum 120 jaroj  
Massimo Acciai: La urbo  
Ulrich Becker: La inico  
Mikaelo Bronŝtejn: Peco de kablo  
Jorge Camacho: Sep rakontetoj  
Luiza Carol: Ĉu vi scipovas ludi  
tomlandilon?  
Leen Deij: Tenu la amon  
brulanta!  
Vimala Devi: Dubo  
István Ertl: Ducent mejloj ĝis  
Talooska  
Ruben Feldman Gonzalez:  
Rememoroj pri dolĉa patrino  
Judit Felszeghy: Iam, ne dimanĉe  
Lina Gabrielli: La unua de aprilo  
Gbeglo Koffi: Rampejo  
Paul Gubbins: Cirkvita perturbo  
Sten Johansson: Pordo al la maro  
Lena Karpunina: Ordinara vizaĝo  
Miĥail Korotkov: Io devas okazi  
Mao Zifu: Unu monato  
Geraldo Mattos: Vivogumo  
István Nemere: Du mikronoveloj  
Leif Nordenstorm: Signoj dum  
ŝtormo  
Raita Pyhälä: Post unu vivo kune  
Christian Rivière: Go-ludo  
Sen Rodin: La ŝtelo-mano  
Giorgio Silfer: La violeta zontuko  
Trevor Steele: Feliĉan  
Kristnaskon  
Lenke Szász: Nekrologo  
Paulo Sérgio Viana: Geedza ringo  
Tim Westover: Rulkreskaĵo  
Etel Zavadlav: Ŝtelisto Hadit kaj  
lia frato  
Biografietoj

29 noveloj  
179 paĝoj  
200 svedaj kronoj  
plus sendkostoj

Eldona Societo Esperanto  
Esperantoförlaget  
Retadreso: [eldona@telia.com](mailto:eldona@telia.com)  
Telefon: 070-5850054

## Universala Kongreso de Esperanto i Köpenhamn den 23-30 juli 2011

Anmälningavgifter (svenska kronor )

	-31/12 -10	-31/3 -11	1/4 -11
1. Direkt medlem i UEA(ej MG)	1600	2000	2400
2. Icke direkt medlem i UEA	2000	2500	3000
3. Medföljande, handikappad eller ungdom(född mellan 81-01-01 och 90-12-31), som är medlem i UEA	800	1000	1200
4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är medlem i UEA	1200	1500	1800

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 90-12-31 betalar ingen kongressavgift. Anmälningblankett för kongressen kan beställas hos:  
Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby, tel. 0415-50152,  
[bertil.andreasson@horby.mail.telia.com](mailto:bertil.andreasson@horby.mail.telia.com)  
Eftersom kurserna är så osäkra kan avgifterna komma att justeras.



# Kristnasko kaj ties historio

*Kristnasko estas eble la plej grava festo en Svedio, sed ne ĉiu konas ĝian historion.*



## Memoro pri Jesuo

Kristnasko havas plurajn diversajn radikojn. Unu el ili estas la festotago pro la memorigo de la naskiĝo de Jesuo Kristo.

Kristnasko estas kristana festo por soleni la naskiĝon de Jesuo Kristo. Ties dato estas la 25-a de decembro (sed pro malsamaj kalendaroj kelkaj ortodoksaj kristanaj eklezioj solenas tiun tagon en la komenciĝo de januaro - laŭ nia kalendaro).

Fakte oni ne scias kiam vere naskiĝis Jesuo. Nur en jaro 354 la Eklezio decidis soleni naskon de Kristo je la dato de ĝistiam pagana festo en Romio 25-a de decembro.

## Solstica festo

Tiu estis antaŭe romia festo de *sol invictus* (ne-venkita suno), ĉar en tiu tago post la vintra solstico la tagoj ree ekplilongiĝas kaj de praaj tempoj la paganaj ritoj festas tiun naturan aferon ligita kun la reveno de espero lumo varmo promeso de ontariko. En Romo la Saturnaj tagoj (*saturnalia*) disvolviĝis de la 17a de decembro ĝis la Kalendaroj de januaro, t. e. la dek lastajn tagojn de la jaro. Ili estis origine festitaj honore al Saturno romia dio de agrikulturo. Ankaŭ kun la naskiĝotago de Mitrao, dio el Irano ligiĝis tiu festo de *sol invictus*, kaj li estas dio de lumo, kaj simbolis lukton kontraŭ

la mallumaj kaj malbonaj fortoj. Ties kulto enradikiĝis en Romia imperio.

Tial Eklezio volis kontraŭi tiujn kulton kaj festojn, kies gojigaĵojn ĝi ne povis malhelpi, kaj kies simboloj konvene kongruis kun tiuj de la nasko de Jesuo Kristo, kristanigante ilin. Kaj Papo *Liberus* fiksas kiel la daton de la naskiĝfesto de Kristo la 25-an de decembro. La bakkanalecaj emoj de la antaŭaj festoj restis je la nova kristana festo, precipe la kutimo festeni!

Alia ebleco kial la eklezio elektis la 25an de decembro por festeni la naskiĝon de Jesuo, estis ke estis praktika afero elekti tagon kiam nekristanoj jam festenas.

Cetere la mezvintraj festeno ne nur en Romio, sed en multaj kulturoj. La vorto "Julo" estas uzata i.a. por la praskandinava mezvintra festo.


## Advento

La semajnoj antaŭ kristnasko, en kiuj kredantoj anime prepariĝas al la festo, nomiĝas advento. Advento dekomence estas fasta periodo, ĉar fasto devas okazi antaŭ festo. Ankaŭ en nia tempo multaj kredantoj iel fastas dum advento.

Populariĝis adventaj kalendaroj, el kiuj infanoj povas preni aŭ frandaĵon aŭ vidi bildon malantaŭ pordeto, kiun ili ĉiutage malfermas.

La tradicio pri abioj dekomence apartenas al advento. En la abio oni metis kvar kandelojn, kiujn oni devis lumigi, po unu en ĉiu adventa dimanĉo. En Svedio la kandeloj nun translokiĝis de la abio al apartaj adventaj kandelingo, sur kiuj oni ĉiudimanĉe ekbruligas unu plian.

## Sankta Nikolao, koboldoj kaj Avo Frosto



En Esperanto mankas unueca nomo por la viro, kiu alportas donacojn dum kristnasko, i.a. pro tio ke la tradicioj pri li venis de malsamaj fontoj.

Sankta Nikolao (ĉ. 280-351) estis greka episkopo greka episkopo en Mira en Likio. Li estas konsiderata sanktulo. Lia figuro estis la bazo por la infana kredo de kristnaska donacoportantoj.

En Nordio oni tradicie kredis je etaj koboldoj (*svede: [gårdstomt]*), loĝantaj en aŭ apud la domo, gardantaj la bestojn. Oni kredis ke la koboldoj postulis ke oni bone rilatu al ili kaj ne kolerigu ilin. Se oni ne obeis al tiu postulo, ili povis esti danĝeraj.

La sveda artisto Jenny Nyström komencis pentri pli grandajn koboldojn similajn al Sankta Nikolao. Dum la 1930-aj jaroj la sveddevena usonano Haddon Sundblom desegnadis reklamojn por Kokakolao. Tie aperis viro simila kaj al la nordiaj koboldoj kaj al Sankta Nikolao. Pro la influo de Kokakolao tiu estaĵo fariĝis monde konata kiel Kristnaska viro, Patro Kristnasko, Sankta Nikolao aŭ Avo Frosto. Ne kezistas unueca vorto en Esperanto!

Leif Nordenstorm  
*La artikolo parte estas kopiita el esperanta Vikipedio.*

## En la librobreto



### - Forsman verkis

Lars Forsman verkis interesan svedlingvan libron pri sia vivo kiel esperantisto, pri esperanto kaj pri homoj kiujn li renkontis. Ĝi estas facile legebla, kaj enhavas multajn fotojn. Li ricevis subvencion de SEF por la eldono, kaj li vendis ĝin en la librofoiro de Gotenburgo kaj en la kunveno en Norrköping. (Prezo 150 kr, aŭ malpli se vi aĉetas rekte de Lars).

### - Pri Zamenhof

El multaj libroj kiuj aperis en esperanto tra la mondo lastatempe, kvar malgrandaj kajeroj nun troviĝas en la librobreto de Esperanto-Centro en Stockholm. Aleksander Korĵenkov eldonis biografian skizon pri Zamenhof, fakte resumo de mullte pli dika libro kiu aperis pasintjare, kaj kiu baldaŭ aperos je dua eldono. Por multaj esperantistoj, tiu ĉi maldika kajero sufiĉas por havi pli da scioj pri la vivo de Zamenhof. (Prezo 70 kr)

### - Dek libroj kaj dek gazetoj

Aliaj du kajeroj, ankaŭ eldonitaj ĉi-jare de Sezonoj, Litova Esperantot-Asocio, enhavas ekondukon al dek libroj kaj al dek gazetoj, kiuj havis influon al la historio de esperanto. La tekstoj devenas el la rubriko "Nia trezoro", kiu regule aperas en "La ondo de esperanto". La unua kajero prezentas kelkajn el a bazaj verkoj pri esperanto, ekde la "unua libro" ĝis la libroserio "plena verkaro de L L Zamenhof". La dua kajero prezentas la unuajn revuojn, el kiuj la unua komencis aperi en la jaro 1889, ĝis la hodiaŭa "Monato". (Prezo por unu el ili 60 kr)

### - Planlingvoj

Kvara kajero estas interesa por tiuj kiuj interesiĝas pri interlingvistiko. Véra Barandovská-Frank verkis kajeron pri "Latinidaj planlingvoj", kiu aperis kunlabore kun Akademio internacia de la sciencoj (AIS) en San Marino, eldonita en Paderborn. (Prezo 60 kr)

### - Glumarkoj

Krome, la librobreto de Esperanto-Centro en Stockholm enhavas nun glumarkojn pri la kongreso en Kopenhago. (Prezo 10 kr por folio je 12 markoj).

La librojn oni povas mendi ĉe la adreso de SEF, aŭ per retpoŝta adreso [libroservo@esperanto.se](mailto:libroservo@esperanto.se). Al la prezoj aldoniĝas pakmaterialo kaj sendkostoj.

## ANEKDOTOJ

### Kial havi idojn?

La familio manĝas en... familia memserva restoracio.

Ĉe apuda tablo, knabeto grimpas sur sian patron kriante:

- Panjo! Panjo! Panjo!

Ĉe alia tablo, bebo ploregas:

- Ŭaaaaaaa!

Ĉe tria tablo, bubeto kuras ĉirkaŭ la ejo hurlante:

- liiii haaaa! liiii haaaa!

Ĉe la geKrukoj, Adoleksa Amando restas perpleksa:

-Kial homoj entute havas idojn? Vidu jam: ili konstante kriaĉas, petadas aĵojn, plendegadas.

Ŝi turnas sin al la gepatroj: Sed kiam tio finiĝas!?

Jozefino seke respondas:

- Ni sciigos vin.

### Efika metodo

Jozefino televidas programon pri sano.

Televidulo: Nun ni parolos pri metodo kiu senmanke povos forbruligi vian korpgrason, firmigi viajn muskolojn, beligi vian haŭton, plibonigi vian memor-kapablon, malpliigi vian nervoz-econ, plifortigi vian mongajn-potencialon, pliriĉigi vian amor-vivon, malpliigi vian riskon je preskaŭ ĉiu malsano, kaj igi vin aspekti kaj senti vin jarojn pli juna...

Jozefino ekstaras kaj krias: Jes, jes, jes! Mi prenas! Mi tuj aĉetas! Televidulo: Temas pri... fizika ekzercado!

Jozefino: Ho fek!

### Celtrafa dormeto

Sabate posttagmeze, Kruko dormetas sur la sofo.

Eta Joĉjo diras al sia fratino:

- Mi scivolas kial paĉjo tiom ofte dormetas.

Adoleksa Amando:

- Li diras ke per ili lia menso restas klarpensa.

Joĉjo:

- Ĉu vere? Do, mi scivolas kial li ne pli ofte dormetas....

### Nur unu manko

Viro fanfaronas al sia amiko:

- Mi ne fumas, ne drinkas, ne uzas tabuajn vortojn, niam kokras mian edzinon. Fakte, mi havas nur unu mankon: mi tro multe mensogas.

### La nifo

Kruko kaj Baniko hejmen-promenas nokte, kiam Baniko rigardas la ĉielon kaj subite vidas...: Vidu! Vidu! Estas NIFO!

Kruko:

- Kion?

Baniko:

- NIFO, precize tie! Neidentigita Fluganta Objekto!

Kruko:

- Ĉu vi kredas?

Baniko:

- Ĝi tutcerte venas de ali-stela planedo. La nifanoj devas havi eksterordinaran teknologion por povi vojaĝi tian longan distancon ĝis Tero.

Ili eble havas superlongajn vivdaŭrojn, aŭ eble ili kapablas vojaĝi tra nigraj truoj, transirante enormajn distancojn en kelkaj sekundoj.

Kruko:

- ??

Baniko:

- Taksante laŭ la grandeco de la ŝipo, ili verŝajne estas samgrandaj kiel ni, aŭ malpli grandaj. Aŭ eble ili utiligas kvantumspacon por igi la ŝip-internon pli granda ol la ekstero! Aŭ....

Kruko:

- He, tio ne estas NIFO, ĝi estas nur aviadilo.

Baniko:

- Kio? Ĉu vere?

Kruko zorge rigardas, kaj konstatas ke fakte temas pri aviadilo.

- Malkontente: Fek! Flugantaj objektoj estas pli amuzaj kiam ili restas... neidentigitaj!

Kruko:

- Ne maĝoju, ulĉjo. Eble la piloto estas Frodo la Hobito....



## NOVELO

# La neatendita morto kaj la resurekto de iu Elizabeto Andersson

Kiam Elizabeto Andersson alvenis al la urba biblioteko por redoni kelkajn librojn, ŝi hontis. Por ŝi estis pli rutino ol escepto redoni librojn malfrue. Ĉiun fojon ĉio okazis en la sama maniero. Metante la librojn sur la tablo de la bibliotekistino Elizabeto Andersson sentis ruĝon kaj varmon disvastiĝi sur siaj vangoj. La bibliotekistino komputile registris la redonon kaj rigardis la komputilan ekranon, sur kio indikiĝis kiom da punpago Elizabeto devas pagi. Same aŭtomate kiel la komputilo registris la punpagon, la bibliotekistino elparolis la sumon, akceptis la punpagon, registris la pagon per la kasregistrilo kaj donis al Elizabeto kvitancon.

Ĉiun fojon la samo okazis, krom hodiaŭ. Post la registriĝo de la redonitaj libroj, la bibliotekistino unue rigardis la komputilan ekranon kaj poste Elizabeton, poste denove la ekranon kaj denove Elizabeton.

"Kiom kostas?" demandis Elizabeto.

"He, neniom, ĉar ŝajnas ke via biblioteka karto ne plu validas. Ĉu vi translokiĝis al alia urbo?"

"Ne."

"Strange. Se oni ne plu loĝas en nia urbo, nia komputilo aŭtomate ricevas sciigon de la komunuma komputila centralo kaj oni forstrekigigas de nia registro. Do, okazis ia eraro. Vi tamen nur ĝuu tion. Vi estas bonŝanca. Viaj ŝuldoj malaperis laŭ nia komputilo, kaj ni donos al vi novan bibliotekan karton... Ne, strange, mi ne plu trovas vian nomon en ĝi.

"Ĉu?"

"Do, mi tamen konas vin. Ni registros viajn pruntojn surpapere, kaj kiam vi revenos ni aranĝos ĉion. Bone?"

Elizabeto Andersson dankeme akceptis la proponon, prunteprenis kelkajn librojn kaj iris sur la straton. Ĉu estas tempo por butikumi? Jes. Sed unue mono estas bezonata. Ŝi iris direkte al

banka aŭtomato, kie ŝi kutimis maldeponi monon. Ŝi enmetis sian karton, perbutonis sian kodon, sed nur ricevis mesaĝon "Maldepono malebla. Ni retenas vian karton. Kontaktu vian bankon."

Feliĉe la banko estis malfermita. Elizabeto Andersson atendis sian vicon kaj klarigis sian problemon al la oficisto. Li serĉis sian nomon en sia komputilo.

"Vi diris Elizabeto Andersson?"

"Jes."

"Sed ŝi mortis hieraŭ. Se vi estas heredanto vi ne rajtas uzi ŝian bankokarton, sed vi devas atendi la dispartigon de la heredaĵo. Ĉu vi estas heredanto?"

"Ne, tute ne. Mi estas Elizabeto Andersson mem. Mi ne mortis. Vidu ke mi eĉ ne estas malsana. Devas esti ia miskompreno."

"Atendu fraŭlino, mi alvokos mian estron.

Alvenis la bankdirektoro.

"Bonan tagon, f-ino Andersson. La afero statas tiel, ke laŭ nia komputila sistemo vi mortis hieraŭ. Pro tio la banka aŭtomato rifuzis al vi maldeponi monon, sed ni ja tute bone vidas ke vi vivas."

"Jes, kaj mi eĉ ne estas malsana."

"Ni tamen komputilrete ricevas informojn pri civitanoj de la Buroo por registrado de civitanoj. Do, vi devas iri tien por informiĝi."

Elizabeto Andersson adiaŭis la bankdirektoron kaj komencis promeni al la buroo. Nur malofte ŝi estis tie. Eĉ eble nur unufoje, kiam ŝi havigis la necesajn dokumentojn por aĉeti pasporton. Post kvinminuta promeno ŝi alvenis. Enirinte ŝi alparolis deĵorantan virinon kaj klarigis sian problemon.

"Bonvolu montri legitimilon," ŝi diris.

Elizabeto elmonujigis sian legitimilon. La oficistino studis

ĝin zorgeme kaj komparis la foton kun la vizaĝo de Elizabeto.

"Sendube estas via legitimilo. Se mi kontrolas vian personan numeron en mia komputilo, mi povas vidi ke en la urba hospitalo iu kuracisto hieraŭ subskribis dokumenton ke vi mortis pro aŭtoakcidento.

"Sed tio ja estas absurdaĵo. Mi ja vivas. Jes, mi fakte legis pri la akcidento en la hodiaŭa gazeto, sed..."

"Do, mi kontrole telefonos al la hospitalo. Bonvolu atendi."

La oficistino telefonis al la hospitalo kaj klarigis la problemon. Post kelkminuta atendado ŝi ŝajne ricevis la respondon. Ŝi remetis la aŭskultilon kaj denove turniĝis al Elizabeto.

"Do, la kuracisto ege bedaŭras. Okazis aŭtomobila akcidento. Oni alvokis la parencojn de la mortintoj kaj vunditoj, kaj unu el ili atestis ke iu mortinto estas Elizabeto Andersson. Kaj, tio fakte pravis. Ŝi nomiĝas same kiel vi. Vi devas konscii ke kaj viaj persona kaj familia nomoj estas tre komunaj en nia lando."

"Jes, ni estis kvar Elizabetoj en mia klaso, kaj ĉiuj nomis min Andersson. Tio tute ne plaĉis al mi. Do, nun vi povas ĝustigi la eraron, ĉu ne?"

"Nu atendu. Ni fakte faris eraron. Tion ni bedaŭras. Sed vi ankaŭ naskiĝis en la sama tago kiel tiu alia Elizabeto. Do, viaj personaj numeroj estas ege similaj, same kiel viaj nomoj."

"Mi ne plendas. Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras. Tamen nun ion faru. Ĝustigu la eraron kaj mi estos kontenta.

"Tamen, ne estas tiel simple. La komputila sistemo ne antaŭvidis resurekton de homoj. Se ni do registris vin morta, vi estos morta laŭ la sistemo, eĉ se vi sentas vin tute sana."

"Nekredeble!"

"Ni tamen povas ion fari. Mi parolos kun mia estro. Bonvolu telefoni morgaŭ."

"Dankon! Mi tion faros. Adiaŭ!"

"Adiaŭ!"

Elizabeto reiris surstraten. Kion fari? La laboro komenciĝos posttagmeze. Eble plej bone iri hejmen por ion manĝi. Subite ŝi ekvidis la novajn gazetafiŝojn de la vesperaj gazetoj, kiuj nuntempe aperas frue posttagmeze. Ŝi proksimiĝis.

Terurigita ŝi komencis legi la tekston. "Kvar personoj mortis pro aŭtoakcidento." Sub la teksto aperis la bildoj de kvar personoj. Inter ili aperis ankaŭ ŝia portreto: la sama foto, kiun ŝi uzis por sia kondukpermeso. Ŝi komencis rapide iri al la direkto de sia hejmo pensante: "Mi esperas ke neniu konatulo vidos min. Ili kredos ke mi estas fantomo, kiu releviĝis el inter la mortintoj."

Reveninte hejmen Elizabeto telefonis al sia oficejo.

"Saluton. Parolas Elizabeto."

"Sa..."

Elizabeto rekonis la voĉon de sia estro kaj daŭrigis:

"Eble vi vidis la gazetafiŝojn."

"Jes... de kiu loko vi telefonas?"

"Fakte nek de la ĉiela regno, nek de infero. Mi nur volas diri ke estas eraro. Mi ne mortis, sed mi deziras libertempon hodiaŭ, por ke homoj en la urbo ne kredu ke mi estas promenanta fantomo."

"Dankon al Dio. Ja estas terure. Vi ĝuu libertempon hodiaŭ. La gazeto certe povos malkonfirmi jam morgaŭ."

"Dankon. Ĝis!"

Elizabeto remetis la aŭskultilon. Ŝi tuj telefonis al la gazeto, kiu pardonpetis promesante malkonfirmon. Ŝi denove prenis la aŭskultilon por fari eĉ pli gravan alvokon.

"Lo" Ha lo!"

"Saluton panjo, estas Elizabeto."

"Saluton!"

"Ĉu vi vidis la gazetafiŝojn?"

"Jes, sed nek mi nek paĉjo kredis ke estas vi, ĉar ni vidis vin el nia fenestro ĉi-matene, kiam vi iris al la urbo. Verŝajne estas tiu alia Elizabeto. Mi kaj ŝia panjo estis en la sama akuŝejo samtempe. Post tio mi ne renkontis ŝin. Kompatinda! Ŝi estis la ununura filino."

"Jes, kompatinda. Do, vi tamen scias ke ne temas pri mi."

"Cetere, ĉu vi volas florojn?"

"Kial?"

"Multaj homon sendis al ni florojn, por bedaŭri pri la funebro."

"Ne dankon. Ĝis."

Kiam Elizabeto remetis la aŭskultilon ŝi sentis ke ŝi samtempe estas laca kaj maltrankvila. Ne eblas ripozi. Tamen eble estas pli bone iom promeni. Ŝi surmetis sian mantelon kaj eliris sur la straton. Estis varmeta printempa tago. Sur la stratoj kaj en la parkoj homoj promenis ĝuante la belan veteron. La plej multaj homoj ne aparte atentis ŝin, sed Elizabeto rimarkis ke kelkaj fikse rigardas ŝin... Aŭ ĉu ŝi eble nur imagis tion. Ne, du virinoj intense rigardas ŝin mallaŭte babilante inter si. Ili aspektas ŝokitaj. Nun ili alparolas viron, kiu staras apude kaj fingre montras al Elizabeto.

Elizabeto ne plu emis promeni. Pli bone iri hejmen, por atendi tie ĝis la morgaŭa gazeto malkonfirmos ŝian morton. Tio fakte estas ebleco ĝui bonan libron. En la hodiaŭa mondo malofte estas tempo por ripozi. Do, kio restas nelegita sur la librobreto? "Amo kaj morto en Balio", "Al torento", "El verva vivo ĵurnalista". Jes, la lastan ŝi elektis, kaj fakte ege ĝuis la legadon, ĝis sonoris la porda sonorilo. Ŝi iris tien por malfermi. "Bonan tagon. Mia nomo estas Henriko Miller. Mi laboras por asekurkompanio Popola. Ĉu vi estas f-ino Elizabeto Andersson?"

"Jes."

"Do, ni ricevis raporton de civitano, kiu vidis vin vivanta en la urbo, kvankam la Buroo registris vin morta."

"Jes, feliĉe mi vivas. Mi estas eĉ tute sana. Bone, ĉu ne?"

"Fakte ne. Vi klopodis trompi asekurkompanion. Tio estas grava krimo."

"Ha! Fakte temas pri eraro. Mi ne mortis, sed alia Elizabeto Andersson, kaj la gazeto erare raportis."

"Do, vi diru antaŭ la kortumo."

"Adiaŭ!"

Elizabeto fermis la pordon kaj reiris al "El verva vivo ĵurnalista", sed la emo legi ne revenis. Baldaŭ la telefono sonoris.

"Bonan tagon! Estas la Buroo por registrado de civitanoj."

"Bonan tagon!"

"Ni ekzamenis vian problemon kaj ni havas ian solvon."

"Ĝis?"

"Kiel mi diris nia komputila programo ne antaŭvidis resurekton. Do, ni devas krei novan personecon por vi. Vi ricevos novan personan numeron, sed la saman nomon kiel nun. Ĉu bone?"

"Ĉu povos esti iaj problemoj?"

"Ni ne certe scias. Komputiloj en diversaj ŝtataj kaj aliaj burooj interligas sin per komputila reto. Se estos problemoj, vi nur telefonu al mi kaj ni klopodos solvi ilin."

"Do, dankon, ĝis!"

"Ĝis revido!"

La venontan tagon Elizabeto tute normale laboris en sia laborejo. La matena gazeto raportis pri sia eraro. Ŝi devis rakonti pri la implikoj pri sia morto al siaj laborkolegoj, kaj eĉ ridis kune kun ili. Reveninte hejmen ŝi trovis leteron en sia poŝtkesto. "Al la gepatroj de la infano Andersson." Kun tremantaj manoj ŝi malfermis ĝin.

*Estimataj civitanoj!*

*La komunumo gratulas al vi pro la naskiĝo de via infano. Ĝia persona numero estas 060405-8920. Ni petas al vi plej eble baldaŭ elekti personan nomon por ĝi. Indiku ĝin sur la ĉi-kuna formularo kaj sendu ĝin al Buroo por registrado de civitanoj.*

*Vizitu la distriktan kuracejon por vakcinado kaj mezurado. Informojn pri viaj rajtoj kiel gepatroj vi ricevos de la sociasekura servo. Post kelkaj monatoj la komunumo sendos al vi informojn pri infanejoj.*

*Altestime*

*Buroo por registrado de civitanoj*

**Leif Nordenstorm**



# Diana en lunlumo

Ŝi devas esti Diana, sed tio ne prosperas. Unue la lumo estas malbona. Li kovras la fenestrojn kaj aranĝas lampon oblikve super ŝi, sed la rezulto estas tro malluma. Tio pensigas pli multe pri bordela sceno ol pri arĝenta lunbrilo karesanta la ĉastan korpon de l' diino, kaj kiam li altigas la meĉon, la damnita lampo haladzas ĝenante lian koncentriĝon. Li devus havi elektron! Al diablo, kiel do eblus pentri Dianan sen elektra lumo?

Krome estas io pri ŝia pozo. Jen ŝi staras kun unu kruro antaŭ la alia, la kapo levita, la rigardo gvatanta pri ĉasaĵo kaj kun lia promenbastono en la etendita mano. La bastono rolas kiel pafarko – li ne havas tian en sia rekvizitaro, sed li povos pentri ĝin laŭ sia interna imago. La tuto aspektas iom kabarede pro tiu promenbastono kaj ŝia nuda korpo, tamen ne tio estas la plej terura, sed ŝia mieno, kvazaŭ ŝi rigardus lin kun indulga amuziĝo.

“Rigardu foren, Aŭgusta”, li diras. “La diino gvatatas al cervo inter la arboj.”

Ŝi ĵetas al li rigardon kaj poste turnas la okulojn al alia parto de la ateliero, kie forlasitaj toloj, gipsaj fragmentoj kaj ĉia rubo kunpuŝiĝas kolektante polvon. Sed al kukolo, ĉu ŝi nun jam mienas ironie? La diablo prenu ĉiujn virinojn! Iufoje li pensas, ke la Eternulo konfuzis la aferon, modlante la virinon, ĉar evidente li blovis animon absolute senan de ĉia artosento en tiun grandiozan korpon.

Cetere estas io fuŝa ankaŭ pri la korpo de Aŭgusta. Certe, ĝi estas bela kaj bone flegita, kaj ŝi sendube ne aĝas pli ol dudek kvin, tamen troviĝas io tie, kio ne kongruas kun lia ideo pri Diana.

Li paŭzas kaj glutas etan viskion, faldas pecon de fenestra kovrilo por ke radio el taga lumo forlavu la etoson de buduaro.

“Nu, do ni povas rekomenci”, li poste vokas.

Vane. Neniu Aŭgusta videblas. Li paŝas en la kuirangulon kaj

pluen sur la tegmentan terason. Jen ŝi staras, pli-malpli kovrita de farboplana pentrista kitelo, kiun li devus jam forĵeti, fumante maldikan cigaron de iu malmultekosta marko. La diablo prenu fumantajn virinojn! Kiam ŝi etendas la brakon por forskui cindron, ĉiu ajn ĉirkaŭanto povus admiri ŝiajn nudajn ŝultrojn kaj la supron de ŝiaj mamoj. Vere, ne troviĝas aliaj ĉirkaŭantoj ol kolomboj sur la tegmentaj firstoj, sed tion ŝi ne povas scii.

“Tuj mi estos preta, kaj vi povos daŭrigi”, ŝi diras suĉante la tabakan fumon kun maldeca mieno.

Li jam petis ŝin diri al li sinjoro Lundén, sed ŝi ignoras tion. Krome ŝi direktas al li impertinentan rigardon ŝajne esprimantan, ke lia kreado amuzas ŝin sed apenaŭ signifas ion seriozan.

\*\*\*

Ili sidas en eleganta kafejo, ĉiu kun sia grego. Brorsson kiel ĉiam havas vaporon en la kapo.

“Kara amiko, ne permesu al modelino tirani vin! Vi devas malsovaĝigi tiun katinon. Ĉu vi jam posedis ŝin?”

“Certe ne. Oni devus neniam konfuzi kreadon kun erotiko.”

“Stultaĵo. Zorgu fari tion, poste vi trovos ŝin komplezema kaj konsentema. Ŝi ja ne estas senkulpa knabino? De kie vi akiris ŝin?”

“De Palmkvist.”

“Bone. Do vi trankvile prenu kion vi volas. Tiu virkoko postlasas nenion virgecon, se li povas tion eviti. Sendube tion ŝi atendas, ŝi pensas ke tiel devas esti. Do, dum vi nenion faras tiudirekte, ŝi supozas ke io mankas al viaj naturaj instinktoj. Regalu ŝin per Marsala vino kaj migdalaj biskvitoj, poste vi amindumu ŝin ĝisfunde. Nun ni prenu ankoraŭ drinkon. Pri kio vi nuntempe okupiĝas? Ĉu pri Diana, vi diris?”

“Prave. En arbaro sub lunbrilo. Se mi nur sukcesos aranĝi la lumon super ŝi.”

“Ne ĝenu vin pri tio. Gravas la interna lumo, ĉu ne, kaj tiun vi ja havas, kolego. Vi hazarde ne bezonus faŭnon en via arbaro?”

“Ne. La sola afero kiu mankas al mi estas pafarko.”

“Tian mi ne disponas. Vi do devos fidi je la saĝoj de Amoro.”

\*\*\*

Vilhelm Lundén kun certa maltrankvilo decidas provi tion, kion proponis lia delonga konato Edvard Brorsson. Ne por kontentigi tiun, ĉar li vere trovas la ideon malaprobinda. Sed li ne povas lasi la aferon pasi kiel antaŭe. Por ke iam realiĝu lia granda Diana en lunlumo, la malbeno devas esti iel dissolvita. Li tamen ne emas iri absolute en la brido de sia amiko, do li rezignas la Marsalan kaj anstataŭe aĉetas botelon da ĉerizvino. Li supozas, ke tiu plaĉos al Aŭgusta.

“Ho, kiel dolĉa”, ŝi diras, tamen plu trinketante la rubenruĝan trinkaĵon.

Sed ŝi ne volas gustumi la konfititajn pirojn, kiujn li proponas.

“Mi ne tre ŝatas tiajn sukeraĵojn.”

“Aŭgusta, ĉu vi scias, kia figuro estas Diana?”

“Mi memoras ke vi nomis ŝin greka diino. Jen sendube kial devas esti nudajoj.”

“Ĉu vi do jam konatiĝis kun la antikva mitologio?”

“La artisto Palmkvist montris al mi kelkajn. Unu Venuson, kaj ankoraŭ iujn, mi ne memoras la nomojn, sed ili estas tri damoj.”

“Eble la tri graciaj.”

“Sendube tiel ili nomiĝas”, diras Aŭgusta trinkante la vinon. “Ili estas tri nudulinoj, kvankam pentritaj laŭ la sama modelino. Ŝi estas Lovisa Hansson el la cigarvendejo de Randell. Sed li pentris tri malsamajn vizaĝojn sur ili, por ke la sinjoroj ne rekonu ŝin, se ili venos en la vendejon. Tamen la korpo estas ŝia, de ĉiuj tri.”

“Do ni esperu, ke neniu rekonos tiun.”

Ŝi ekridas kaj levas kontraŭ li sian montrofingron.

“Nun vi parolas tro maldece, mi trovas. Lovisa estas bona knabino. Ŝi estas tiu, kiu proponis al mi pozi antaŭ Palmkvist.”

Lundén replenigas la glasojn. Strange, kiel nun facilas babili kun la knabino. Nur la pentrado iras malglate. Pli frue hodiaŭ li faris novan provon, tamen li interrompis ĝin pro malespero kaj anstataŭe surtabligis la vinon. Nun Aŭgusta sidas en lia malnova pentrista kitelo plena de makuloj. Ŝi metis unu kruron sur la alian, kaj la karno ĉirkaŭ ŝia genua faldo estas blanka kaj glata. Ĝi aspektas agrable mola.

“Diru, ĉu mi rajtas fumi?” ŝi demandas.

“Ĉi tie ne. Estas tro da olefarbo kaj terebinto kaj toloj en la ateliero. Sed mi ŝtopos mian pipon, kaj ni iros sur la tegmenton.”

Antaŭ iom da tempo pluvis, kaj nun la vespera suno rebrilas de la ladaj tegmentoj. La kolomboj sidas babilante en siaj kutimaj lokoj. Klakado de hufoj kaj tintado de pasanta fiakro sonas de la suba strato. Ili staras silente. Li ne memoras iam antaŭe fumi kun virino, kun glaso da vino enmane.

Ŝia cigareto finiĝis kaj ŝi eltrinkas la lastajn gutojn el sia glaso. Li klakas per la pipo kontraŭ defluilo por malplenigi ĝin. Ili reeniras kune.

\* \* \*

Post kelkaj tagoj li rezignas la lampon kaj permesas al la taglumo trafi ŝin deflanke. Devas esti senkaŝa plenluno, neniu romantika klarobskuro. La promenbastonon li anstataŭigas per peniko, kiu malpli draste ĝenas la etoson.

Li jam devas pretigi ĉi tiun tolon. Atendas lin aliaj ideoj, Aleksandro kaj la Gordia nodo, Apelles kaj la ŝuisto, kaj ankoraŭ aliaj. Sed nun temas pri Diana. Li pentradas senlace.

Aŭgusta ne plu mienas ironie, jen almenaŭ unu bona rezulto. Eble do Brorsson pravis. Sed prefere ne estu tro da paŭzoj en la kreado. Li ne intencas lasi kateni sin. Hieraŭ vespere ŝi eĉ ne reiris hejmen. Estis tro malfrue, tro mallume eksterdome, ŝi asertis. Sed

hodiaŭ li zorgos fini ĝustatempe. Ŝi ne rajtas saboti la arton. Morgaŭ unu lasta pozado, poste li povos pretigi la pentraĵon sen ŝi. La pafarkon, la arbaron, la lundiskon kontraŭ malhelblua nokta ĉielo – por fari tiujn li ne bezonos Aŭgustan.

Nun ŝi staras surterase kun sia ĉiama eta cigaro. En liaj nazotruoj restas tiuodoro de la lasta nokto. Li turnas la stablon al la fenestro, dum minuto fermas la okulojn kaj lasas la vizion traflui lin. La fiera, ĉasta Diana kun sia blanka haŭto kaj la levita arko en nokta arbaro, lumigata de blublanka, pura lunlumo. Poste li malfermas la okulojn.

Jen la bildo rekte kontraŭ li. Ne eblas eskapi de ĝi. Ĝi estas bone pentrita – li lertas pri sia metio – sed ĝi ne estas Diana. Ĝi neniam estos Diana. Ĝi estas Aŭgusta, rozkolora, kontenta Aŭgusta, iom vaporanta pro amorado, kun rigardo kiu ŝajnas al li plena de atendoj. En tiuj okuloj troviĝas neniu cervoĉaso. Plenigas ilin sopirado je domo kaj hejmo kaj edzo kaj idoj, kaj okulangule eta cigaro en la krepusko.

Li prenas la tolon for de la stablo, portas ĝin al la fora fino de la ateliero, metas ĝin kontraŭ muron, kun la dorso eksteren. Poste li sidiĝas sur seĝo staranta tie. Li fermas la okulojn pensante. Aleksandro. Eble Palmkvist konas iun junulon kun la ĝusta korpo. Pecon da ŝnuro li sendube havas, kiun eblos nodi. La glavo, bone, tiu do estos la promenbastono. Ĝi estos mirinda verko. Nur unu afero maltrankviligas lin. Kion diros pri tio Aŭgusta.

Sten Johansson

## Liten vepa

Med reklam för esperanto  
Lämpig för utställningar



250 kr + porto

Eldona Societo Esperanto  
Esperantoförlaget  
Retadreso: [eldona@telia.com](mailto:eldona@telia.com)  
Telefon: 070-5850054

## LIBROJ

### Självstudier för nybörjare



”Lär dig esperanto” är en interaktiv språkkurs från EuroTalk för PC och Mac. Om man vill lära sig esperanto finns ju en hel del läroböcker – både nya och gamla – att utgå ifrån, och inte minst lär-plattformerna Lerno! som dessutom är gratis, men jag tycker ändå att det är ändå positivt att se att esperanto finns med i serien och kunde inte låta bli att prova programmet.

Jag köpte mitt exemplar från Språkbutiken.se, som bara verkar sälja nybörjarnivån, ”Talk Now” på esperanto i svensk utgåva. På EuroTalks hemsida verkar dock även fortsättningsnivåerna ”Talk More”, ”Talk Business” (affärskommunikation), ”Talk the Talk” (ungdomsspråk) samt ”Vocabulary Builder” (ordträning för barn) finnas för esperanto. Rimligtvis har även dessa stöd för svenskt användargränssnitt, bara att omslaget på förpackningen är på engelska, men om inte kan man kanske leva med det.

Talk Now, som nybörjarkursen heter, är indelad i tio delar: Första orden, mat, färger, fraser, kroppen, nummer, tid, handla och länder, samt en speldel för att testa ordkunskap. De nio första delarna är i sin tur indelade i fyra moment: ordövningar, talövningar, lätt spel, svårt spel och möjligheten att skriva ut en bildordbok.

Ordövningarna innebär att orden i avsnittet läses upp, omvärtannat av en manlig och kvinnlig talare tillsammans med en bild och ordet i textform. I talövningen, som förutsätter att man har en mikrofon till datorn, kan man spela in sitt eget uttal och jämföra med det förinspelade uttalet. Det lätta spelet går ut på att fyra ord från avsnittet, illustrerade med bilder, slumpas fram och läses upp av talarna. Bilderna flyttas sedan om, ett av orden läses upp igen, varefter man ska klicka på bilden med det sista upplästa ordet. Det svåra spelet går ut på att peka ut den bild eller det föremål som läses upp från ett lite större urval av bilder, och utan att alla läses upp först. För att kunna öva orden utan dator finns som sagt även möjlighet att skriva ut en bildordbok med alla avsnittets ord.

Det ska också gå att exportera de inspelade orden och fraserna till mp3-format och lyssna på dem i musikspelare. Just detta fungerade dock inte med min dator, utan resulterade i ett felmeddelande om en mapp som inte kunde hittas. Det kan förstås vara en bugg i den svenska utgåvan, eller bara i Windows-versionen; jag har inte provat om det fungerar bättre på Mac. Vidare finns det en del särskrivningar och andra mer typografiska småfel i den svenska översättningen av gränssnittet, men det är i mina ögon överkomligt.

Avsnittet med fraser kan nog mest liknas vid en reseparlör, och kursen tar inte upp någon grammatik utan syftar kanske mest till att bygga upp ett grundläggande ordförråd och användbara fraser. (Kanske fortsättningskurserna gör det.) men vill man lära sej esperanto mer grundligt är kanske Lerno! eller någon lärobok för självstudier att rekommendera i första hand. Talk Now-kursen kan dock säkert fungera bra som ett första steg för nybörjare, och som komplement till andra självstudier, för att öva och höra uttal.

Olof Pettersson

### Agrabla miksaĵo



*Sen Rodin. Nu, kaj do? Rakontoj, Raportoj, Recenzoj, Revvoj. 159 p. Exit. Kluĵo 2010. 9.90 euroj ĉe [www.uea.org](http://www.uea.org).*

La enhavo de la libro jam estas priskribita en la subtitolo de la verko. La ĝenro ”rakontoj” tamen en si mem entenas multajn diversspecajn anekdotojn, ekde rakontoj nepre fikciaj ĝis ”Sankta Maria”, rakonto pri ital-rumana paro, kiu deziras geedziĝi kvankam unu nomo malsamas en diversaj dokumentoj de la viro. ”Del-lira monereto” montras ke Eŭropo preskaŭ perdis la viron, kiu fariĝos verkinto de tiu ĉi libro. Kiel? Legu mem.

En ”La aventuroj de Pinokjo” oni rimarkas ke Esperantio estas malgranda kulturo. La aŭtoro komparas du diversajn tradokojn de Pinokjo en Esperanto (unu de Mirza Marchesi, alia de J. Horvath). La unua montriĝas esti la onklino de Se Rodin. Kvankam interesa komparo dubindas ĉu oni recenzu verkon de parenco.


En la libro ankaŭ enestas allogaj ilustraĵoj, kiuj plialtigas la valoron de la libro.

La verkinto Sen Rodin, pseŭdonimo de Filippo Franceschi en 2007 publikigis la libron ”Bildoj pri norda lando kaj aliaj rakontoj”, kiu temas pri kelkaj jaroj kiam li gastlaboris en Svedio.

Ĉar la enhavo de la libro estas miksitaj ankaŭ versajne ĉiu trovos kelkajn partojn, kiuj plaĉos al tiu.

Leif Nordenstorm

## En esperanto- lärares minnen



*Lars Forsman: "Esperanto ... över 50 miljoner träffar" 135 sidor. Eget förlag. 2010. 125 kr hos larsespo@yahoo.se*

"Ett konstigt språk som nån tokstolle hittat på. Naturligtvis blev det aldrig någonting av det." Ungefär så tror jag att man kan sammanfatta den allmänna svenska uppfattningen om esperanto – hittilldags. Det har långsamt börjar växa fram en medvetenhet om att vi låter engelskan ta över och förkväva vårt språk, och även andras, men att esperanto skulle kunna vara en del av det språkförsvar som man försöker mobilisera, det har man ännu inte riktigt förstått.

Lars Forsmans bok "Esperanto ... över 50 miljoner träffar" är – ja, att kalla den en brandfackla eller stormklocka vore helt fel; den är en varmt personlig, mycket humoristisk skildring av en språklärares halvt motvilliga upptäcktsfärd mot esperanto. Som så ofta med esperantister fick han ett antal puffar, innan han till slut som lärare i engelska och tyska vid Karlskoga Folkhögskola började lära sig detta märkliga språk – och blev helt intagen av det. Sedan dess ägnar han sig åt det och åt dess människor. Esperantister är inga glöddögda fanatiker; man plöjer sin fåra med upphovsmannen Ludvig Zamenhofs milda personlighet som föredöme. Om


honom och hans genialiska skapelse berättar Lars Forsman medryckande i sin bok, varvat med en mängd lustiga episoder ur den egna esperantolärarkarriären, allt illustrerat med ett stort antal foton.

Boken är alltså både en självbiografi och en introduktion till esperanto. Det är en dubbelt unik bok: så vitt jag vet finns det ingen självbiografi som så kunnigt och samtidigt smittande berättar om vägen till esperanto, och ingen introduktion till språket som är ens tillnärmelsevis så personlig som denna. Har man väl börjat läsa den, kan man bara inte släppa den.

Folke Wedlin  
språklärare vid Lerums  
Gymnasium,  
sekreterare i Svenska  
Esperanto-Institutet

## Novelaro kun diverseco

*Vizaĝoj, novelaro 2000-2009. 175 p. Eldona Societo Esperanto, Stokholmo 2010. 200 SEK ĉe [www.algonet.se/~eldona/](http://www.algonet.se/~eldona/)*



Mi ĵus ellegis la libron kun 29 multlandaj noveloj. La noveloj estas tre diversaj laŭ stilo kaj

ankaŭ laŭ la enhavo. Ili tuŝas multajn temojn de la vivo, kaj ĉiutagajn kaj fantaziajn. La lingvouzo de la verkintoj estas tre varia. Kaj tio tre plaĉis al mi. Mi ŝatis ĉi tiun libreton. Ĝi estas foje amuza, foje malĝoja kaj foje pripensiga. Certe ĉiuj legantoj trovos eĉ plurajn favoritojn inter ili.

Multaj noveloj plaĉis al mi kaj mi ŝatas la libron ĝuste pro la granda diverseco de la rakontoj. Jen du el miaj plej ŝatataj: "Tenu la flamon brulanta!" de Leen Deij. La rakonto okazas kiel en Esperantio. Lernejoj infanoj prezentas teatraĵon kaj unu sama problemo reokazadas dum la tuta prezentado. Ĉi tio malgraŭ ĉiuj klopodoj kaj de la infanoj kaj de la instruistoj. Leen Deij humure skribas kaj la rakonto donas bonan senton. Mi mem havas infanojn kiuj teatrumis kaj mem spertis ke tiel povas okazi. Kiom ajn da serioza klopodo, la rezulto tamen povas fariĝi alia ol la origina celo.

"Iam, ne dimanĉe" de Judit Felszeghy. Nur post duonpaĝo mi komprenis kiu estas la ĉefpersono de ĉi tiu novelo. Ĝi estis agrabla surprizo. Mi ne volas ĉi tion nun rakonti ke ankaŭ vi povu same surpriziĝi kiel mi. Ĉi tiu rakonto estas tre senteme skribita per malĝojaj sentoj pri vivo, maljuniĝo kaj morto, pri soleco kaj senesperigo. Sed ankaŭ pri egalrajto al la vivo kaj pri fidela amo.

Kial ne eldoni tutmondan novelaron ĉiujare? Mallongajn interesajn rakontojn multaj esperantistoj povus skribi. Mi volonte legos ĝin!

Mehdi Beatrix Strid